

HUNGARA VIVO

3

1973

8,– Ft

LEHEL 230

PREZO 5680,– Ft.

FRIDUJO LA FRIDITA
MANĜAĴKAMERO
DE LA LOĜEJO

PRODUKTAS HŰTŐGÉPGYÁR

LEHEL

E HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto — Asocio
XIII. jaro, 1973. 3-a numero

Numero pri Budapesto

ENHAVO

Gábor Garai: Mia turmento kaj plezuro Budapest (tr. *Kalocsay* 1
Béla Vihar: Budapest: Eŭropo (tr. *Kalocsay)* 1
L. Kökény: La loksidiĝoj de Bpeŝto dum 2000 jaroj 2
Dr. L. Lesznai: Budapeŝtaj stratoj rakontas muzikhistorion 6
P. Rados: Pri la Budapeŝta teatro THALIA 7
Sz. Bálint: La hungara tipografio estas 500-jara 8
Sz. Bálint: Historio de Budapeŝta statuo 8
Hukaja Sitoŝi: Unu japano en Budapeŝto 9
Panoramo pri Budapeŝto 10
J. Mátéffy: Kelke da elstaraj arkitekturaj restaĵoj en Budapeŝto 12
Leo Szilárd: Raporto el la Centra Stacidomo (tr. *V. Benczik)* 14
Mihály Ladányi: Sen ekstazo (tr. *Kalocsay)* 16
Péter Kuczka: Stratoj, domoj, placoj (tr. *M. Fejes)* 16
Lajos Tárkony: Mia Budapeŝto 16
Zsolt Gyarmathy: Johano Bólyai kaj la lingvo 18
Miklós Gádoros: Tajdo en karsto 19
Árpád Rátkai: Fondiĝo de HESL antaŭ 60 jaroj 20
P. Balkányi: Moseo, alia dramo de Madách 21
Facilaj legaĵoj 24—25
Árpád Abonyi-Nagy: Iam mi havis ĉevalon 22
Elek Benedek: La kaproungoj en Balatono (tr. *K. Nyitray)* 25
Humuro 25
Lajos Tárkony: Revuo de Revuoj 26
Károly Szakonyi: Je la sepa horo (tr. *L. Oberding)* 27
Recenzoj 28
V. Benczik: Ekzameno sen risko 29
Forumo 29
Leterkesto. Al ĉiuj esperantistoj 30
Korespondi deziras 30
Feri: Krucvortenigmo pri Budapeŝto 31



Gábor Garai

MIA PLEZUR KAJ MIA TURMENTO, BUDAPEST

Magio prujnofreŝa de stratoj frumatenaj,
bremsogrincado kruda de oldaj busoj astme penaj,
somer-kaprico de la banejoj ĉampanŝpruc-koloraj,
senfina kruto de la ŝtuparoj ĉefofic-kontoraj,
belegaj damoj pelten kudritaj — prirabitec fremdula —
sundronoj grandaj vintre tra fum kaj vual nebula,
knabinoj ŝvebe ekfloraj en papavet-jupetoj,
krepusk-vizioj inter elektrolumaj stratostretoj,
jen vi, resti deviga, arde altira nest,
mia plezur kaj mia turmento, Budapest.

De vi mi eterne fuĝus — nur for, for! — mi min pelas,
sed min via veneno kaj mielo rekverelas,
kaj, kiel al silenta — al mi ne donita — naskvilaĝo,
angore mi rerapidas: ĉu ne sanĝiĝis al vi la vizaĝo,
ĉu vi ne iĝis fremda jam dum semajno kurta?
Ho, la revojaĝadoj, ploregaj skuiĝadoj sur relopar suburba!
Montoj, knabaĝaj veproj, Tabanaj rev-promenoj,
bulvarde, en morbaj telefonbudoj, hasto ĝis folaj duonsvenoj,
jen vi, resti deviga, vibre altira nest,
mia plezur kaj mia turmento, Budapest.

Novstrate perloblanka kaj milda vic domara,
en pluv tram-atendantoj kun sia sturm amara,
anhelaj tage nokte fabrikaj maŝinaroj,
homoj el ĉambro fridiĝa al svarm de trotuaroj,
Danub tenera, murda kun sia ferum' sep-ponta,
tagiĝ de vagabondoj, ho, kien perdiĝonta!
Juvel varia de la futuroj film-rapidaj,
glacio resobriga de miaj tagoj disprodigaj,
flamflor ekscita, ke miaj lamfidaj noktoj brulu,
vi min en mondon metis, vi min en morton lulu,
naskinta kaj murdonta, resti deviga nest,
mia plezur kaj mia turmento, Budapest!

Béla Vihar

BUDAPEST: EŬROPO

Nek bulvardojn viajn nek la densan reton de viaj mil stratoj
nek la montorulajn ondojn de viaj pejzaĝoj
nek armeon de viaj puls-ritmaj fabrikoj, uzinoj
mi laŭdas nun en vi, Budapest,
sed salutu ĉi tiu poemo
la nobla-profilajn vicojn, al via tuto apartenantajn,
de radiafruntaj viroj kaj virinoj, brulokulaj
gejunuloj kaj heredoportaj olduloj,
kiuj, soifante la bonon, triumfigos
la belojn koncipitajn en animprofundoj,
la novajn, aŭdacajn kaj ofte vipatajn kreaĵojn
en la arĝentea pieco de koncertsalonoj, teatroj, galerioj.
Ilin, viajn infanojn, mi alvokas, dum tra la ondosfero
de informaĵoj ili signas unu al la alia
la sparkantajn mesaĝojn de libroj, filmoj,
bruligaj pensoj arkantaj en la futuron:
pri rondodanco, el sub cedro de tagiĝo-teksitaj mitoj,
la profundan suspiron de la materio en noktosilento,
vekrion el gorĝo Ijoba, vorticajn viziojn
de la lando disipa, famon pri embarasa morto de ostaĝo,
mediteranajn lumojn de amoj reaperigitaj sur celuloida rubando.
La armeon de ĉi neorganizita kaj tamen unueca,
kvankam eta, sed ĉiam kreskanta, konscia federacio
mi salutas, per kiu fidele kaj senŝancele
vi apartenas al Eŭropo. Vi, ornama per kuntrena rivero,
per juvelo de pontoj, mia Urbo praa kaj juna,
kiu distingas per ĉi kolektivo la veran
disde l' falsa kaj atente pri l'neĝpuraj flamoj de l'Spirito,
ŝilde kontraŭ la ferocaj ventoj levas
vian ŝirmantan kaj varman polmon,
por ke neniam estingiĝu ĉi flagrado,
orfloro lumanta de via rango.

Tr.: K. KALOCSAY

La loksidiĝoj de Budapeŝto dum 2000 jaroj

En la nordokcidenta parto de nia ĉefurbo, ĉe Peŝthidegkut troviĝas la groto *Remete*. La esplorfosadoj en 1914 kaj 1949 malkaŝis dektri tavolojn konstruiĝintajn unu super la alia. La tieaj eltrovaĵoj etendiĝas tra la mezepokaj, eraviskaj kaj romiaj restaĵoj, kaj tra la fer- kaj bronzepokoj tute ĝis la malfrua ŝtonepoko.

Do temas rondcifere pri 10 000 jaroj antaŭ nia erao! En tiu forega tempo ni povas riverenci antaŭ la plej malnova loĝata teritorio de nia Budapeŝto.

Nun ni venu pli proksimen al nia majesta Danubo, sur kies dekstra bordo krutaj rokoj nin atentigas, ke jen ni staras ĉe piedo de la monto *Gellért*. Sur la deklivo de tiu ĉi grava monto — kvankam nur 235 metrojn alta — oni elfosis loĝkavojn de homoj, vivantaj same en la ŝtonepoko. Ankaŭ argilaj vazoj — kelkloke trovitaj — kun rubandformaj ornamaĵoj atestas pri tio, ke jam antaŭ 5—6 jarmiloj ekzistis homa vivo sur tiu ĉi regiono.

Tamen ĝis la alveno de la keltodevenaj eraviskoj nia teritorio estis nur maldense loĝata. La eraviskoj mem iom antaŭ nia erao kreis sur la dekstra bordo de Danubo iomete urbaspektan komunumon. Ili loĝis sur la deklivoj kaj ĉe piedo de la monto Gellért. Kaj ili ekloĝis ankaŭ pli norde. Tiu ĉi norda loksidiĝo havis la nomon Ak-ink (abunda akvo).

La Romia Imperio en la 1-a jc. laŭ nia erao okupis novajn teritoriojn, i.a. ankaŭ Transdanubion, kies nomo en tiu tempo fariĝis Pannonia. La Imperio etendis siajn limojn norden kaj orienten ĝis Danubo. Fondiĝis soldataj tendaroj, vilaĝoj kaj urbetoj. Sur la loko de Ak-ink estis konstruita la ĉefurbo de Pannonia: Aquincum. Ĝiaj vaste etendiĝantaj ruinoj eĉ en niaj tempoj efike ilustras la potencan romian regadon.

Metiistoj zorgantaj pri la bezonaĵoj de la soldatoj, komercistoj havantaj kontaktojn kun la provinco, eĉ kun la tuta regno, sklavoj laborantaj en metiejoj kaj kurbdorsiĝantaj pro la peza laborado — popolumis Aquincum. Kaj kune kun la garnizono, vivanta sub insigno de la fieraj romiaj agloj — el la iama malgranda loksidiĝo estiĝis floranta urbo.

Elvolviĝis ankaŭ la kultura vivo. Lokaj artistoj lerte pentris la murojn de la guberniestra palaco kaj de la domoj de riĉeguloj, ili skulptis la diostatuojn de la preĝejoj. Ne mirinde, ke la memoraĵoj de la arto kaj la ekonomia evoluo de Aquincum ankaŭ nuntempe instigas gapadi la spektantojn.

Dum Aquincum pli frue estis unu el la elirpunktoj de la invado trans la alian bordon de Danubo, sur la maldekstra bordo — ĉe la Peŝta abutmento de la ponto Erzsébet (Elizabeta) konstruiĝis en 294 fortikaĵeto, malgranda soldata kolonio: Contra-Aquincum („castrum"), kiu en la unuaj tempoj servis la ekonomi-karakteran konkeron trans la limoj de la Imperio, sed poste ĝi devis servi la ĉiam pli malfacilan defendon.

Do la brilepoko de la urbo ne daŭris longe. La mondkonkera Romia Imperio, atinginte sian plej grandan amplekson, jam ekkadukiĝis, tiu ĉi sklavotena socia ordo estis minacata de krizo, eĉ de disfalo.

Post la falo de la Romia Imperio dum kvin jarcentoj daŭris la ĉefa ondado de la popolmigrado sur tiu teritorio kaj nur fine de la 9a jc. komenciĝis ĉi tie kontinua evoluo. — La romiaj legioj formarŝis, ĉ. 400 ili forlasis Aquincum kaj forfuĝis ankaŭ la riĉa urba loĝantaro. La pli malriĉaj tavoloj retiriĝis al la nuna Óbuda (Malnova Buda) kaj baldaŭ diseriĝis en la tumulto de la popoloj venantaj-irantaj.

Venis unu post la aliaj la hunoj, la orientaj gotoj, la longobardoj, ili sieĝis la urbon kaj la ĉirkaŭaĵon, sed ili ne scipovis ĉi tie enradikiĝi, iliaj primitivaj cirkonstancoj ne ebligis la daŭrigon aŭ revivigon de la iama urba vivo. Nur la varhona popolo povis resti sur tiu teritorio preskaŭ du jarcentojn. Provizore ankaŭ Karlo la Granda konkeris parton de la hodiaŭa Hungario, sed li rigardis ĝin nur fora limregiono, kaj baldaŭ li lasis ĝin al la ĉi tie ekloĝintaj slavoj. Tamen ni havas nur iom da spuroj pri tio, ke slavoj estus loĝintaj sur teritorio de Budapeŝto.

Kiam la hungaroj ĉ. la jaro 900 atingis Danubon, ili certe trovis ĉi tie larĝe etendiĝantajn konstrurestaĵojn. La tribo gvidanta la hungaran tribo-federacion ekloĝis en la centro de la freŝe konkerita lando. Kursan — kiu apud Árpád, havanta la efektivan potencon, havis nur la titolon „ĉefprinco, ĉefreganto", posedis kiel fortikaĵon la iaman „soldatan" amfiteatron (ĉe la strato Nagyszombat).

La urbo Peŝt jam en la 9a jc. estis menciita kiel Danuba transpasejo. Nia riverego ĉi tie, en la linio de la ponto Erzsébet estas la plej mallarĝa. Sur ambaŭ bordoj de Danubo estiĝis loĝkolonio jam en la 11—12 jc. Krome troviĝis loĝ-

lokoj ankaŭ en la antikva Aquincum. — Sur la du bordoj de la riverego elformiĝis konturoj de la du urboj: Buda kaj Peŝt.

La nomo de Buda devenas el malnova hungara kromnomo, la nomo de la alia urbo Peŝt, kiun la unuan fojon mencias fonto en 1148, havas slavan devenon. Ĝia signifo estas kalkforno. Sed estas interese; ke ankaŭ la germana nomo de Buda: „Ofen" signifas fornon, kalkfornon.

En 1001 formiĝis mezepok-struktura ŝtato sur la hungara tero laŭ principoj de la feŭdalismo. La unua hungara reĝo, Stefano la Sankta (mortis 1038) stabiligis la novan ordon, sed baldaŭ post lia morto, en 1047 ribelis la adeptoj de la malnova sistemo, kaj la plej konata viktimo de la ribelo fariĝis la episkopo Gellért, kies bela statuo estas iluminata ankaŭ en nia socialismo epoko ĉe festaj okazoj.

En la 12a jc. la nombron de la hungara loĝantaro baldaŭ superis en Buda kaj Peŝt la alinacianoj, venintaj ĉefe el okcidento. Ili faris ambaŭ urbojn — kune kun la hungaroj — gravaj centroj de la komerco, poste de diversaj metioj. Post la elkonstruo de la kristaneklezia organizaĵo Buda fariĝis sidejo de prepostejo, do altranga kristana eklezia institucio.

La prosperon rompis la tatara (mongola) invado en 1241—42. La tataraj armeoj ŝtorme venintaj el la fora oriento, pereigis multajn popolojn. Pereis Peŝt, kaj pereis Buda. Post unu jaro la tataroj tamen devis forlasi la landon.

Post la tatara invado reĝo Adalberto la Kvara (mortis en 1270), klopodis konstruigi fortajn ŝtonfortikaĵojn en la tuta lando. Konstruiĝis fortikaĵo ankaŭ sur la loko de la nuna „Burgo" (Vár), kaj tie li konstruigis ankaŭ reĝan kastelon kaj tri preĝejojn; el tiuj lastaj ankoraŭ nun staras la Matias-preĝejo kaj la turoj de la du aliaj preĝejoj. — En tiuj jaroj multaj loĝantoj de Peŝt ekloĝis en la Burgo, kies nomo fariĝis Buda, kaj la komunumo sur la loko de la iama Aquincum ricevis la nomon Óbuda



La reĝa palaco, Buda — dum la regado Matiaso Hunyadi (1458—1490)

(Malnova Buda). — Ĉi tie ni menciu ankaŭ la „perlon" de Danubo, la Margaret-insulon, kie vivis kiel monaĥino Margareta, la filino de la reĝo Adalberto. Pri la tiama vivado sur la insulo, en la monaĥinejo temas en la romano de Gárdonyi: „Sklavoj de Dio", ĵus aperinta ankaŭ en Esperanto.

Cetere dum longa tempo ne Buda aŭ Peŝt estis la „ĉefurbo" de la lando. La reĝo havis sian rezidejon antaŭe en Esztergom, respektive en Székesfehérvár, poste dum mallonga tempo en Visegrád. Tamen la centra situo de Buda kaj Peŝt baldaŭ alportis, ke la reĝaj kaj ŝtataj institucioj — iom post iom estiĝantaj — havu sian rezidejon en Buda.

Kaj fakte Peŝt kaj Buda en la 14a jc. jam estis la ĉefaj urboj de nia lando. La reĝo Ludoviko la Granda (1342—1382) fondis en Buda universitaton kaj faris la urbon sia reĝa rezidejo. Li donacis al la urbo ankaŭ „la rajton de haltigo de varoj", kio signifas, ke la komercistoj veturantaj tra la urbo, devis vendi siajn varojn en la urbo mem, se troviĝis aĉetanto.

En 1387 komenciĝis la duoncentjara regado de Sigismundo, kiu poste estis elektita ankaŭ germanaromia imperiestro. Tiu ĉi grandlinia, tamen lozmorala regnestro konstruigis belegan reĝan palacon en la Burgo, kaj tiun palacon reĝo Matiaso poste kompletigis en renesanca stilo.

En la 15a jc. jam ankaŭ Peŝt estis ĉirkaŭata de ŝtonmuroj, (kies restaĵoj ankaŭ nun estas spekteblaj). La nuntempaj Tolbuĥin-, Muzeum- kaj Tanács- bulvardoj, la strato Deák Ferenc kaj la riverego Danubo estis la limoj de la urbo Peŝt en la mezepoko, eĉ ĝis la fino de la 17a jc. La muroj kun rondbastionoj kaj kun kvar pordegoj defendis la urbon.

Dum la regado de Matiaso Hunyadi (1458—1490) Buda vivis sian novan brilepokon. La reĝo plu konstruigis en la Burgo. En la reĝa palaco estis lia famega Biblioteko. Ĉi tie diskutis la scienculuj kun la reĝo, ĉi tie li traktadis kun la eksterlandaj diplomatoj. La regado de Matiaso estis glora tempo ne nur de Hungario, sed ankaŭ de Buda kaj Peŝt.

Post la morto de Matiaso la feŭdala anarkio endanĝerigis la ekziston de la lando. La klasa subpremo kaj la mizero streĉis la animojn: en 1514 okazis kamparanmilito en Hungario. La revoluciaj armeoj de György Dózsa batalis ankaŭ ĉe la muroj de Peŝt kaj Buda. Kaj la plimulto de la grandsinjoroj pli malamis la kamparanojn, ol amis sian patrujon. El tio sekvis tragedio de la hungara nacio.



Buda dum la subturka malliberio (1541—1686)

En 1526 la turka armeo venkis ĉe Mohács super la hungara armeo. De 1541 ĝis 1686 Buda kaj Peŝt — kune kun granda parto de la lando — estis posedaĵo de la turkoj. La evoluo haltis, la vivo stagnis, Buda kaj Peŝt suferis multege dum la 145-jara turka okupado. La turkoj rigardis Hungarion konkerita lando, simpla provinco. Ili konstruis nur ĝamiojn kaj moskeojn, kaj ankaŭ banejojn. La banejoj Rudas, Király kaj Császár, krome la Tombkapelo de Gül Baba — ĉiuj en Buda — ĝis hodiaŭ montras orientajn arkitekturajn elementojn. Dum la 145 jaroj de la turka okupado 46-foje furiozis la epidemio de pesto en Buda kaj Peŝt kaj gastadis ankaŭ post la foriro de la turkoj. Pri tio atestas ankaŭ la baroka Sankta Triunuo-Statuo en la Burgo (1713) kaj la kapelo Rókus en Peŝt (1711).

La okcident-eŭropa kristana mondo en 1686 organizis liberigan armeon por forpeli la turkajn okupantojn. La ĉefa organizanto estis la Roma papo mem, Inocento la XI-a, kiu ricevis statuon pro liaj meritoj en Buda-Burgo. Kiam la 2-an de septembro la sturmantaj grupoj invadis en la internan parton de la fortikaĵo, Buda liberiĝis. Miloj da kadavroj sur la stratoj, amasegoj da rubaĵoj prezentis malesperan spektaklon. Ankaŭ „kristanaj" soldatoj montriĝis kruelaj, ĉar ili mortigis ankaŭ virinojn kaj infanojn. La ĉefa pastro de la mahometanoj estis mortigita ĝuste en la preĝejo Matiaso.

Estis necesaj kelkaj jardekoj por atingi tolereblan vivon en la du fraturboj kaj ĝenerale en la lando mem, kiu same estis liberigita el la turka okupado. (En Buda kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo ekloĝis ĉefe enmigrintoj el la germana teritorio, en Peŝt hungaroj kaj serboj.) La urba vivo dum la 18a jc. komencis disvolviĝi. En tiu jarcento la loĝantaro de la urboj konsistis grandparte el terkulturantoj, la gilda industrio kaj la komerco povis doni okupon nur por malpli granda parto de la loĝantoj. La produktaj fortoj tamen iom post iom pliiĝis. Precipe la komerco de Pest evoluadis. La foiroj en tiu urbo fariĝis famaj kaj vastaj. Ankaŭ la konstruado revigliĝis.

Ankaŭ la liberalaj kaj demokrataj ideoj alvenis en nian patrujon. La bonaj patriotoj trasentis, ke venis la tempo por detrui la feŭdalan sistemon kaj levi el la mizera sorto la kamparanojn kaj aliajn subpremitajn tavolojn. Ankaŭ ĉe ni organiziĝis radikala movado, kies gvidantoj estis Martinovics kaj Hajnóczy. Ilia sorto estis: ekzekuto sur Kampo de l' Sango en 1795. Multaj patriotoj suferis longtempan prizonpunon.

Komence de la 19a jc. la tri urboj: Peŝt, Buda kaj Óbuda evoluadis kun pli freŝa elano. La urboj fariĝis centroj de la tutlanda komerca trafiko. Fondiĝis Beliga Komitato por la laŭplana konstruo de la urboj. Jam estis fondita la Urba Ĝardeno, konstruita la granda Hospitalo Rókus (nun Semmelweis). La agado de grafo Stefano Széchenyi (1791—1860), „la plej granda hungaro" kaj baldaŭ ankaŭ tiu de Ludoviko Kossuth (1802—1894), la plej eminenta patrioto de la 19a jc., plirapidigis la evoluon. Fondiĝis la Hungara Scienca Akademio, la Nacia Muzeo kun granda biblioteko, la Nacia Teatro. La centro de la hungara kulturo fariĝis definitive la urbo Peŝt. Super Danubo estis konstruita la klasika ponto Lánchíd (1849), kiu mem simbolis, ke Buda, Peŝt kaj Óbuda baldaŭ unuiĝos kaj estos nia Budapeŝto — kio fakte okazis en 1873.

La ondoj de la eŭropa revolucio alvenis en Hungario ankaŭ printempe de 1848. La 15-a de Marto fariĝis elstara tago de la hungara liberlukto kaj ĝia ĉefa heroo estis nia Sándor Petőfi. La evoluon ne povis haltigi la venko de la reakciaj fortoj super la revolucio kaj libermilito, kies plej memorindaj scenoj okazis ĉefe en Peŝt kaj Buda.

La politika malvenko (provizora) de la demokratio ne malhelpis la mastrojn de la kapitalo, ke ili fondu fabrikojn, konstruu grandaj loĝodomojn, ĉefe en Peŝt, kaj ankaŭ villojn por si mem sur deklivoj de la montoj de Buda.

De la tria kvarono de la 19a jc. estis laŭplane konstruataj du grandiozaj vojlinioj de Budapesto: Sugárút, nun Népköztársaság útja

(Avenuo de Popolrespubliko) kaj la Granda Bulvardo. Tiam leviĝis la belegaj palacoj de la Operdomo, de la Parlamentejo, de kelkaj imponaj muzeoj, la Baziliko de Sankta Stefano. Tiam oni rekonstruis la Matias-preĝejon kaj konstruis la Fiŝistan Bastionon. Ĉiuj ĉi konstruaĵoj apartenas organike al la urbobildo de Budapeŝto.

En 1873 do unuiĝis la tri fraturboj: Peŝt, Buda kaj Óbuda. En la lasta triono de la jarcento, poste en la unuaj jardekoj de la 20a jc. okazis egaj ŝanĝiĝoj en la vivo de nia ĉefurbo. La avida kapitalismo konstruigis per febra rapidemo siajn fabrikojn kaj ludomojn tiel ke Budapeŝto fariĝis unu el la plej rapide evoluantaj grandurboj de la kontinento. La membroj de la regantaj klasoj gravitis al Budapeŝto, ili elkonstruigis tie siajn palacojn, kaj per sia luksa brilado provis kovri la ŝlimon kaj mizeron de la eksterurboj.

En Budapeŝto estis la centro de la politika vivo. Kaj ĉiam pli novaj instĭtucioj kreskigis la pezon kaj signifon de Budapeŝto en la ekonomia, politika kaj kultura vivo de la lando.

Sed la unua mondmilito (1914—1918) bremsis la antaŭeniron, kaj la dua mondmilito (1939—1945) preskaŭ komplete neniigis „la perlon de Danubo". La vintro de 1944—45 signifis la plej tragikan tempon de la ĉefurbo. Multaj miloj da ĉefurbaj loĝantoj estis deportitaj, mortigitaj. 74%-oj de la loĝodomoj difektiĝis, multaj publikaj konstruaĵoj estis detruitaj aŭ forbuliĝis, la belegaj pontoj estis kruele eksplodigitaj.

Sed la laborantoj ne lasis perdi sian amatan ĉefurbon. La elano de la rekonstruo kreis miraklojn jam dum kelkaj jaroj. La loĝantaro de Budapeŝto, kiu en 1873 estis kvarona, en 1930 unu miliono, en 1944-45 nur 838,000, en 1966 jam atingas la du milionojn. Kaj ni ne forgesu, ke la detruoj pro la kontraŭrevolucio en 1956 ĝuste en Budapeŝto kaŭzis la plejajn damaĝojn.

Finante nian mallongan trarigardon pri la historio de Budapeŝto, ni menciu ankoraŭ du gravajn faktorojn:

La elleviĝo de la hungara popolo, nia stabila interna kaj ekstera situacio estas dankeble al tio, ke niaj laborantoj komprenas kaj subtenas la politikan linion de nia partio kaj fidas, ke ĝi gvidas nian popolon al plua prospero.

La dua grava faktoro estas, ke la 1an de januaro 1951 estiĝis Grand-Budapeŝto. Aliĝis al nia ĉefurbo tiel grandaj urboj, kiel Újpest, Pesterzsébet, Kispest, kaj aliaj gravaj komunumoj, kiuj fakte ankaŭ ĝis 1951 apartenis al la arterio de nia Budapeŝto kaj nun ili vivas sian vivon en nia bela, granda kaj amata ĉefurbo, kies futuron ankoraŭ pli belan garantias la laboro kaj ĝusta politika pensado de ĉiuj laboruloj.

L. KÖKÉNY

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraĵpavilono
EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono
EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo
EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo

UTASELLATO

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno, Budapest V., Veres Pálné u. 24 Tel.: 189-900/160



Budapeŝtaj stratoj rakontas muzikhistorion

En Hungario, fama kiel muzikema lando, estus memkompreneble, ke la stratoj de ĝia ĉefurbo tion respegulu. Sed ni devas konstati, promenante en la diversaj stratoj de la diversaj distriktoj de Budapeŝto, ke en la stratoj ni trovas ja nomojn, kiuj memorigas grandajn kreantajn artistojn de la muzikhistorio, sed ne tiom, kiom devus esti. La ĉefa kialo de ĉi tio estas sendube, ke la plejparto de la stratoj ricevis nomon en la pasinta jarcento, kiam Hungario ne ludis ankoraŭ tiel gravan muzikhistorian rolon kiel en niaj tagoj.

Vagante en la Budapeŝtaj stratoj ni tre ofte renkontiĝas kun la nomo de *F. Liszt*. Ĉi tiu granda personeco (1811—1885) grave influis la tutan Eŭropan muzikan vivon; liaj novstilaj verkoj kaj ne malpli liaj artaj, personaj kaj kulturaj konsiloj, prijuĝoj helpis formi la tutan passintjarcentan muzikhistorion. Lia influo estas rimarkebla eĉ en nia epoko. Ses loĝdistriktoj kaj suburboj gardas lian memoron per stratonomo.

La samepokano de Liszt, *F. Erkel* (1811—1893), kiel muzikhistoria persono ricevis en kvin distriktoj stratojn t.e. oni signis stratojn per lia nomo. Erkel kreis la hungaran nacian operon, verkante plurajn operojn pri naciaj historiaj temoj, uzante melodiojn, kiujn oni sentis vere hungaraj en la 19. jarcento. Krom tio fondis la Hungarlandan operkulturon, gvidis orkestron kaj kune kun F. Liszt estigis muzikan altlernejon, komencis grandmezuran ĥorkulturon, fondis la Hungaran Filharmonian Societon ktp.

Alia grava persono de la hungara muzikhistorio estas *K. Goldmark* (1830—1915), siatempe multe pli konata ol nun, kvankam multaj el liaj verkoj meritus esti pli ofte prezentataj. Lia granda opero „La reĝino de Saba" estis fama antaŭ kelkaj jardekoj en la tuta okcidenta mondo. Lia Violonkoncerto, liaj belaj koncert-uverturoj, lia ĉambra muziko donus grandan plezuron al la muzikemaj aŭskultantoj. Lian nomon ni trovas sur strattabulo de la XII. distrikto.

Interesa rolanto de la hungara muzikhistorio estas *J. Lavotta* (1764—1820). La plejparto de lia vivo apartenas al la 18. jarcento, tamen li helpis krei specialan hungaran muzikstilon, florantan ĉefe en la jaroj 1780—1830. Ĉi tiu stilo estas konata kiel „verbunkoŝ" (muziko alloganta varbiĝi rekrutojn); ĝian influon ni klare aŭdos en la verkoj de Erkel, de Liszt, kelkfoje eĉ de Kodály.

Lia pli juna posteulo estis *B. Egressy* (1814—1851), kiu partoprenis en la granda hungara liberiga milito (1848—49). Li estis komponisto de la fama poemo de Vörösmarty: Proklamo, kvazaŭ dua hungara nacia himno. Lia nomo estas trovebla en strato de la X. distrikto.

Estas kompreneble, ke la du plej famaj kaj konataj hungaraj muzikistoj-komponistoj *Bartók* kaj *Kodály* estas eternigitaj sur strattabuloj en Budapeŝto. Vere, ke ili ambaŭ ricevis ĉi tiun signon de pia memoro nur post la dua mondmilito, kiam la faŝismo estis venkita en Hungario. La nomo *B. Bartók* estas legebla en ses distriktoj de Budapeŝto. Laŭ *Kodály* estas nomata tiu placo, en kiu lia loĝejo troviĝas (1882—1967).

Irante tra la Budapeŝtaj stratoj ni trovas la nomojn de eksterlandaj muzikistoj, kies vivo estas iamaniere ligita kun Hungario kaj Budapeŝto. Ekzistas en la ĉefurbo *Beethoven*-strato (en la III. distrikto) eble memore de tio, ke foje — en la jaro 1880 — Beethoven (1770—1827) donis koncerton en la Burgo kune kun la flutvirtuozo *Punto*.

Alia ne-hungara komponisto devas ĉi tie esti menciata: *Robert Volkmann* (1815—1883), kies muzikverkoj bone reprezentas la romantikan etoson de la 19. jarcento kaj de ĝia muzikkulturo. Estas interese, ke li laboris en la lasta parto de sia vivo (ekde la jaro 1875) kiel profesoro de la Muzika Altlernejo (li instruis tie kompoziciadon). Je lia nomo ni povas rememori en la II. distrikto.

En du distriktoj estas trovata placo kun la nomo *Jenő Hubay*. La violonvirtuozo kaj komponisto J. Hubay (1858—1937) havis la plej grandan meriton eduki multajn mondfamajn violonistojn ekz. *Stefi Geyer, Zoltán Székely, József Szigeti, Ede Zathureczky, Ferenc Vecsey* ktp. sed ankaŭ kiel interpretisto li apartenis al la plej signifaj de sia tempo. Li fariĝis ankaŭ direktoro de la Muzika Altlernejo.

Alian muzikon reprezentas *Pista Dankó* (1858—1903), kies nomon gardas stratoj en la VII. kaj XVIII. distriktoj. Li estas cigandevena hungara populara muzikisto. La muziko, kiun li reprezentis, estas ofte menciata kiel vera hungara „popolmuziko", precipe en eksterlando. Liaj romancoj fariĝis fakte bone konataj kaj estas ĝis nun prezentataj de ciganensembloj.

Ne nur strattabuloj, sed ankaŭ monumentoj memorigas nin pri mondfamaj muzikistoj.

Sur la Budapeŝta Operdomo troviĝas du grandaj statuoj pri *F. Liszt* kaj *F. Erkel*. Krom ili ankoraŭ 16 mondfamaj grandeguloj de la muzikhistorio estas eternigitaj sur ĉi tiu konstruaĵo, de *Peri* ĝis *Goldmark* kaj *Hubay*, montrante la signifajn operverkistojn, kies kreaĵojn oni prezentas en ĉiu operdomo de la kultura mondo — ankaŭ en Budapeŝto.

Estas interese, ke en la X. distrikto estas videbla statuo simbolanta la Muzikon kaj ĉi tie la arton de la harmonioj reprezentas la pola komponisto *F. Chopin* (1810—1849).

D-ro Lajos LESZNAI

Pri la Budapeŝta teatro THALIA

En 1873 unuiĝis Peŝt, Buda Óbuda — medaloj de Tamás Asszonyi

En Budapeŝto troviĝas 16 teatroj, sed neniu el ili vekas tiom da diskutoj, disputoj, eĉ kvereloj, nek havas tiel pasiajn adeptojn kaj pasiajn kontraŭulojn, kiel la Teatro Thalia. Ĝia nomo, tiu de greka Muzo, por ni, hungaroj signifas ankaŭ teatran societon, kiu komence de nia centjaro batalis por progresemaj ideoj, sociaj kaj artaj. Inter ĝiaj fondintoj troviĝis *Sándor Hevesi*, la plej granda hungara reĝisoro, *Zoltán Kodály*, mondfama muzikisto kaj muzik-pedagogo, *Béla Balázs*, kinoesteto kaj aŭtoro de la operlibreto por la „Kastelo de Princo Blubarbulo" de *Béla Bartók, György Lukács*, vaste konata filozofo kaj estetikisto. La celo de la teatro estis surscene batali por socialismo, klerigo, humanismo per la moderna arto.

Ne facila tasko. Ne ĉiu el la publiko emas okupi sin per gravaj problemoj dum teatra vespero. Sed aliaj ĝuste tial fariĝis, kaj ĉiutage fariĝas, pli kaj pli pasia publiko de tiu „politikanta" teatro.

Mi foliumas la albumon eldonitan okaze de la dekjara jubileo de la reviviĝo de l' teatro. En ĝi oni trovas la tutan historion de tiu teatra societo. Ekscite estas legi la vortojn de ĝia arta gvidanto, la ĉefreĝisoro *Károly Kazimir:* „... La talento ne estas konstanta. Oni devas pri ĝi atenti. Atenti oni povas nur laborante... Ne estu fiera pri viaj fiaskoj, nur se vi fiaskis talente... Ne volu subiĝi al la publiko, eĉ se vi volus ĝin levi... Se vi vivus sola sur montosupro, eĉ tiam vi devus pranci mense, por aliĝi al ĉio nobla kaj bona, kio troveblas nur en la tuto de la publiko... La socialismo donis materialan sekurecon al la teatro... kaj por tio ĝi deziras nur homecan, honestan teatro-ludon. Ĉu tio ne estas tro multa? La kapitalisto estis senindulga: li taksis nur la uzeblecon kaj la „produkcion". Ni estas komprenemaj. Kion opinias pri tio la publiko? Ĉu ankaŭ ĝi estas komprenema?... Oni diras: „La publiko volas sin amuzi". Kial? Ĉu la talentuloj ne estas amuzaj? Ĉu Shakespeare, Molière estas enuigaj? Nomu verkon de Aristofano aŭ de Goldoni, kiun ne komprenus je la unua aŭdo eĉ la plej simpla homo. Escepte, se oni estas sentalenta kaj ludas ilin aĉe."

La citita aŭtoro estas eble le plej impona kaj originala figuro de la societo de Thalia. Helpe de la direktoro *Emil Keres* li serĉas ĉiam novajn vojojn de arto.

En la albumo oni trovas fotojn pri la sukcesoj kaj fiaskoj de la ĵusa jardeko. La plej simpatia trajto de tiuj produkcioj estas kuraĝo. Kuraĝo politika kaj arta.

Ni vidu ekzemple la surscenigon de la romano „Rustaĵtombejo" de Endre Fejes en 1963. Unuj nomis la romanon ĉefartaĵo de la socialista literaturo, aliaj ĝin juĝis aĉa, eĉ kontraŭrevolucia. Tiam Thalia ĝin surscenigis, kaj per tio la frazoj de la romano ricevis sian veran akustikon. Post la prezentado la romano stariĝis tien, kun siaj kvalitoj kaj eraroj, kie ĝi devas stari: inter la grandsignifaj verkoj de nia socialista literaturo.

La teatro ofte serĉas por prezento malmulte konatajn verkojn en- kaj eksterlandajn, de aŭtoroj niatempaj kaj antikvaj. Tiel venis sur la scenejon de Thalia dramoj de *Max Frisch* (Andorra), *Nikolaj Wilkowieczki* (Legendo), *J. F. Sartre* (Diablo kaj la bona Dio), *Shakespeare* (Rikardo II.).

Ofte oni povis renkonti en la teatra programo romanojn dramigitajn: krom la menciita „Rustaĵ-tombejo" ankaŭ „Peko kaj Puno" de Dostojevskij, „Monakino" de D. Diderot, du dramigitajn novelojn de Thomas Mann (Fiorenza; Mario kaj la sorĉisto). Ĝi prezentis du dramojn de *Isaak Babel*, la dramon de *Rolf Hochhut* pri la papo Pio XII. De tie ekiris al sia mondkariero „La majoro" de *István Örkény.* Thalia elfosis el la tombejo de forgeso la dramon de *Sándor Petőfi:* „Tigro kaj hieno".

Granda estis la miro, kiam la teatro prezentis la „Komedion" de *Dante* kaj la „Perditan Paradizon" de *Milton.* Poste venis la drama versio de la *Hemingway*-romano:" Por kiuj la sonorilo sonas". Kiam la Budapeŝta humuro nomis la teatron „librodisvastiga entrepreno", ĝi estigis etan librovendejon en sia halo. Sekvis la finna popolepopeo „Kalevala", la hinda epopeo „Ramajana", aperis sur la scenejo la vivovojo de *Béla Bartók.* Specialan spicon havis por la publiko la japana *kabuko-ludo* „Ĉušingura". Venis sur la scenejon „La silenta usonano" de *Graham Green.* Granda sukceso estis lirika ludo de la poeto *Sándor Weöres:* „La boatisto en Luno".

La epopeon *Kalevala* la teatra ensemblo prezentis ankaŭ en Finnlando mem. „el Budapeŝto devis alveni gastoj por montri, kiaj ebloj ekzistas eĉ nun vivigi „Kalevalan" — skribis la finna gazetaro.

Por fini, ni citu la vortojn de *Károly Kazimir* legeblajn ĉe la fino de la albumo: „Popolkleriga teatro! Mi gustumas la ŝajne novan koncepton kaj vortkunigon. Klerigi la popolon ankaŭ en la teatro kaj ĉie, kie tio eblas. Kaj lerni de la popolo sen hontado. Homecon, idealojn, vivovolon. La koncepto de popolkleriga teatro estas propre tiel malnova, kiel la homa kulturo... La vera teatro ĉiam estis la sumo de la plej honestaj ideaj tendencoj."

Pri tio ankaŭ ni estas konvinkitaj. Ni deziras al Thalia bonan laboron kaj multajn sukcesojn okaze de ilia nova prezentaĵo pri turka popola heroo Karagöz (Nigrokululo).

Péter RADOS

La hungara tipografio estas 500-jara

Pasis jam 500 jaroj, de kiam en 1473 aperis la unua presita libro en nia lando, Ĝis tiam la litersoifaj homoj povis legi nur manskribitajn kodeksojn ornamitajn per inicialoj kaj miniaturoj. Sed tiuj estis trezoroj, kaj pro ilia multekosteco ilin povis akiri nur malmultaj homoj.

Dank' al humanista klerulo, al la reĝa vickanceliero *László Karai*, en la urbo Buda estiĝis presejo en 1472, anticipante Britujon, Austrion, Nederlandon, Hispanion. *Karai* estis intimulo de *reĝo Matiaso* kaj la reĝo lin sendis kun grava diplomatia misio al Romo por kelkjara restado. Reveninte el Romo, li kunprenis al Buda presiston de la altranga familio *Massimo*, la lertulon *Andreo Hess*, kiu devenis el Hessen. La germana majstro poste laboris en Buda ne per la gotikaj literoj tiam kutimaj, sed per la rondaj, t.n. romanikaj literoj, kiujn li mem gravuris kaj muldigis per hungaraj juvelistoj laŭ ŝablonoj kunprenitaj el Romo.

Lia unua produktaĵo estis la latinlingva *Chronica Hungarorum* (kronika historio de la hungaroj). La aŭtoro estas nekonata, sed el la teksto estas facile konstati, ke ĝi pretiĝis baze de pli fruaj kronikoj, precipe baze de tiu de *Simon Kézai* el la 13-a jarcento kaj tiu de *Márk Kálti* el la 14-a jarcento. *Hess* sciis pri la hungaroj, ke ili ame kroĉiĝas al sia nacia paseo, tial li publikigis tiun libron kiel la unuan.

„Ĉiu patrioto deziras koni tiun vivon — li skribis en la antaŭparolo de la libro — kiun iliaj prauloj vivis iam, por ke li povu ripeti iliajn memorindajn, eminentajn agojn, kaj, kontraŭe, ke la katastrofoj, kiuj ilin trafis, servu kiel lecionoj kaj estu eviteblaj... Mi kredas, ke ĉi tiu libro estos kara kaj plezuriga por ĉiu hungara homo..."

La libro havis nek titolpaĝon, nek numeritajn paĝojn, ankaŭ la titolon ricevis nur poste. Ĝia lasta ĉapitro havis titolon apartan: *De coronatione regis Mathiae*, nome en ĝi temas pri la kronado de la hungara reĝo Matiaso (1458).

Ĝi estas de malgranda duonformato, konsistas el 67 membranaj folioj, sur ĉiu folio videblas la sama akvosigno: pesilo pendanta sur stelo. Laŭ la bibliografoj, ĝi aperis verŝajne en 400 ekzempleroj. El tiuj restis entute nur 10 ekzempleroj. Krom en la Budapeŝtaj bibliotekoj po unu troviĝas en Leningrado, Parizo, Praha, Leipzig, München kaj Romo.

Oni presis la libron duafoje en Buda, en 1838, kun la titolo *Chronicon Budense*. Niaj verkistoj kaj poetoj, precipe *Johano Arany*, uzis tiun duan eldonaĵon kiel fonton de sia rakonta poezio.

Szilárd BÁLINT

Historio de Budapeŝta statuo

Sur la placo antaŭ la Orienta Stacidomo staras impona statuo de *Gábor Baross* (1848—1892), iama ministro de interkomunikado. Oni nomis lin Ferministro, ĉar kun granda energio li laboris por la evoluigo de fervojo kaj poŝto, por la regulado de Danubo. Li faris la trajnan vojaĝon kiel eble malmultekosta, por allogi vojaĝantojn.

En siaj eksterlandaj studvojaĝoj li vidis en Britlando bronzajn sonorilojn sur la fervojaj kajoj; per tiuj la pordistoj de la atendejoj sonorigis antaŭ trajnekiro kaj laŭte kriis la nomon de la preterveturotaj stacioj. Tio ekplaĉis al la ministro. Hejmenveninte li dekretis, ke ankaŭ en Hungarlando oni uzu sonorilojn sam-maniere.

Post nelonge do longlipharaj pordistoj en belaj uniformoj bategis jam sur la fervojaj kajoj 4—5 kg-ajn sonorilojn brave kaj forte, kaj dume ili kriis la nomojn de la preterveturotaj stacioj tiel laŭte kiel foiraj elkristoj. La loĝantoj ĉirkaŭ la stacidomoj jam lernis parkere la trajnan horaron, la infanoj jam pli bone sciis la trajno-trafikon ol la multobligan tabelon. Nokte oni ne povis dormi pro la granda sonorilbruo. Baldaŭ do oni petis el diversaj landpartoj la ĉesigon de la sonorilado, tiel ke la ministro dekretis forigi la pezajn instrumentojn. Oni lokis ilin en ilarejojn.

Post la morto de G. Baross estis ĝenerala deziro starigi statuon al la ŝatata ministro. Por tio oni formis specialan komisionon kaj oni havis la jam ankaŭ gajninton de la skulptokonkurso (Antal Szécsi). Mankis nur mono.

Tiam venis al la komisiono letero skribita per tremanta mano. Maljuna pordisto proponis, ke oni kolektu la flankenmetitajn sonorilojn kaj el ili oni fandu bronzon por la statuo. La komisiono konsentis kun granda ĝojo. La sonoriloj liveris bronzon en tia kvanto, ke oni povis skulpti ankaŭ flankajn figurojn sur la piedestalon de la statuo.

Dum jardekoj ornamis la placon la monumento de la Ferministro. Sed en la dua mondmilito, ĉe la sieĝo de Budapeŝto, la bronzfiguro estis faligita de bombo aŭ de kanonkuglo kaj grave difektiĝis. Oni riparis ĝin kaj remetis sur sian lokon. Poste pro la konstruado de la subtera Metro-stacio oni devis ĝin formeti. Sed oni faris novan placon apud la stacidomo kaj la rekonstruita monumento ree staras tie, memorigante pri tiu konstrumajstro de nia patrio.

Szilárd *BÁLINT*

Unu japano en Budapeŝto

La Ĉenponto kaj Parlamento

Grafikaĵoj de Anatolij Kalasnyikov *(Sovetunio)*

La Parlamento

Arboj, antaŭhieraŭ ankoraŭ nudantaj, hieraŭ ekburĝonis, hodiaŭ jam nova verdo malfermiĝis. Morgaŭ la tuta urbo perfekte verdiĝos. Reviviĝas la vintra, malgaja, velkinta urbego. Alvenis printempo Budapeŝten. La letero el mia patrinujo rakontas, ke ankaŭ tie ĝuste nun alvenis la printempo. La klimata diferenco inter mia urbo — Tokio kaj Budapeŝto estas tre malgranda, kaj la ĉi-tiea klimato forgesigas de tempo al tempo mian hejmsopiron. Samaj floroj ekfloras en sama tempo ĉi tie kaj en mia lando; jam ankaŭ la karaj bluaj floretoj, la neforgesuminoj floras. Al mia urbo tamen jam neniam revenos tia printempo. Ankoraŭ iam antaŭe ankaŭ la printempoj de nia urbo devis esti tiaj, sed nun ĝi jam fariĝis sensezona, malhela, grizmuroplena, malvarma urbego, kie birdoj, verdoj plu ne troviĝas.

La vico de la budapeŝtaj konstruaĵoj estas bonordaj, ilia alteco estas samnivela, kaj nature tre agrable estas ilin rigardi. Preskaŭ ĉiuj estas ornamitaj, malnovaj, tradiciaj kontraste al la Tokiaj kun senorda alteco, al la tieaj plej modernaj konstruaĵoj kun nenia ornamaĵo, el ferbetono kaj vitro. La Budapeŝtaj domoj estas bele kolorigitaj, la Tokiaj tamen grizas.

Min interesas, ke la ĉefa trafiko estas buso en Budapeŝto, dum en Tokio la rapidfervojoj, nome (kaj subtera, kaj sur- aŭ supertera) t.n. metroo. En Tokio anstataŭ buso 200 metrojn longa metroo el dek vagonoj kuradas po du aŭ tri minutoj tien kaj reen. En Budapeŝto anstataŭ metroo kuradas moderna, bela, hungare t.n. „artikita buso", kiu konsistiĝas el du partoj, kian oni ne trovas en Japanujo, kaj ĝi al mi tre plaĉas.

Ĉi tie kuradas flavaj tramoj. Mi tre ŝatas tramon, ĉar ĝi estas tre simpatia, (nefizike) varma, homeca, kiel avĉjo. Ĝi ne estas rapida, sed nek saltadas kiel buso, do se oni havas multan tempon, tute facile kaj trankvile oni povas legi. Bedaŭrinde ekde ĉi tiu januaro oni ĉesigis la trafikadon de tramo sur unu ĉefa avenuo (Rákóczi út). Ĝi tre mankas al mi. Laŭ la letero el Tokio ankaŭ tie finfine la plej lasta tramo estis ĉesigita. Ankaŭ el Tokio ankoraŭ unu homeco formalaperis. Ĉu momenta nostalgio je malaperanto? Nun jam tra sub Danubo nova metroo interligas la Sudan sd.-n (= stacidomon) en Budao kun la Orienta sd. en Peŝto. Mi ŝatas tiun novan metroon, ĉar ĝi estas tre bela, rapida kaj iomete mi sentas min hejme.

Estas interese, ke en Eŭropo multaj stacidomoj ne havas proprajn nomojn: ekzemple, la Centra sd., la Orienta sd., la Okcidenta sd., ktp. Ankaŭ en Budapeŝto la plej granda, bela stacidomo estas la Orienta sd. En Japanujo la stacidomoj ne havas tiajn nomojn kiel en Eŭropo, sed proprajn, kiel: Sd. Tokio, Sd. Ŝinĵuko, Sd. Nova, Sd. Osako ktp. Krome ĉi tie la fervojaj kajoj estas tre malaltaj, kaj mi vere timas, kiam grandaj radegoj venas antaŭ miajn okulojn, ĉar ĉe ni ĉiuj kajoj havas tiom da alteco, ke ĝi estu samnivela kun la pordoj de trajno por ke ne estu danĝero, kaj oni povu pli facile en- kaj elvagoniĝi. Alia interesaĵo por mi (aŭ eble por japanoj,) estas, ke el fervojaj stacidomoj en Budapeŝto trajnoj ekiras al fremdujoj: al Berlino, al Moskvo, al Parizo, al Bukareŝto ktp. (bedaŭrinde neniu trajno ekiras al Tokio). Kial ĝi interesas min? Ĉar el Tokio ĉiuj trajnoj ekiras nur ien en Japanujo, sed neniam transiras al iu ajn fremdujo, ĉar, kiel vi scias, Japanujo estas insularo, kaj oni povas viziti fremdujon nur per aviadiloj aŭ per ŝipoj. Mi ne povas imagi, ke la trajno, kiu ekiris de la Orienta sd. en Budapeŝto matene, jam tagmeze alvenas al la Okcidenta sd. en Vieno, ĉefurbo de la najbara fremdujo!, kvankam mi jam kelkfoje tion spertis mem. Kia fantastaĵo ĝi estas! Se japanoj volas viziti Eŭropon, ili devas vojaĝi pli ol 30 horojn en mallibera aviadilo.

Nun jam leontodoj komencis montri al ni bekhavajn semojn, baldaŭ somero venos, brila, gaja somero... Kion mi faru somere? Eble mi vizitos naĝejon sur Margaret-insulo kun amikoj, kiuj studas en sama universitato kun mi — la filologia fakultato de Universitato ELTE (Eötvös Loránd-Universitato), kie troviĝas unusola oficiala fako de Esperanto en la mondo. Aŭ mi promenos sur la fortikaĵan monton en Budao. Mi atendas varman, belan kaj veršajne memorindan someron de Budapeŝto.

HUKAJA Sitoŝi

Budapeŝto, 1945; post la milito

Budapeŝto ĉefurbo de Hungario, estas 2000-jara loĝteritorio, en kies estiĝo — simile al aliaj metropoloj — la geografiaj faktoroj estis decidaj. Ĝi situas de la ekvatoro je 4739 kilometroj kaj distancas 5263 kilometrojn de la Norda Poluso. Super nia ĉefurbo brilas la Suno ĝenerale 2000 horojn jare. Dank' al Karpatoj, parte al Alpoj, kaj al niaj mezaltaj montaroj, Budapeŝto estas inter la eŭropaj ĉefurboj unu el la plej ŝirmitaj de vento. La jara mezproporcia temperaturo de Budapeŝto — laŭbaze de la mezuradoj de la lasta duonjarcento — estas 11 °C. La plej malvarma monato estas januaro, meznombre minus 1 °C. La plej granda varmo estas en julio, mezproporcie 22 °C. La nombro de la ekstreme varmaj tagoj estas ĉirkaŭ 20. En la vintra sezono la temperaturo estas sub 0 °C. nur dum 30 tagoj.

***

La loĝantaro de Óbuda, Buda kaj Peŝt en 1873 unuiĝinte, en la jaro 1869 nombris 302 milojn. El la tiama 15,5 miliona loĝantaro de la lando entute 1,8 procentoj loĝis en la ĉefurbo. Laŭ la 1971-jara popolnombrado 2 milionoj, t.e. 20 procentoj de la 10,4 miliona tutlanda loĝantaro estas hodiaŭ budapeŝtano.

***

En Budapeŝto — kiu apenaŭ estas iom pli ol 0,5 procentoj de la teritorio de la lando — koncentriĝas 20 procentoj de la loĝantaro, 28 procentoj de la lukrantoj kaj 36 procentoj de la tuta industria produktado.

panoramo

panoramo

Pri Budapeŝto

Budapeŝto estas ankaŭ la spirita centro de la lando: apud la Hungara Scienca Akademio kaj apud la plej grandaj unuversitatoj de nia lando, tie troviĝas la plej multaj teatroj, muzeoj, sciencaj institutoj, libroeldonejoj, redakcioj de ĵurnaloj kaj revuoj. El la 131 esploristitutoj de la lando 105 funkcias en la ĉefurbo. Proksimume kvar kvinonoj de la sciencaj esploristoj kaj profesoroj akirintaj diversajn sciencajn rangojn, laboras en Budapeŝto. En la ĉefurbaj altlernejoj studas 41 mil studentoj, pli ol la duono de la tutlanda studentaro.

***

La temperaturo de la 80 termalfontoj en la ĉefurbo — estas 24—78 gradoj, Tiu ĉi abunda akvokvanto nutras 12 termalbanejojn. La budapeŝtaj sanigaj mineralakvoj bone servas kontraŭ reŭmatismoj, sangcirkulaj kaj virinaj malsanoj.

Budapeŝto, la 2000-jara banurbo ricevis ankaŭ internacie la banejurban rangon efektive nur en 1937: la unua Internacia Kongreso pri Banejaferoj tiam deklaris Budapeŝton kuracbanejo. Post la dua mondmilito la difektitajn aŭ preskaŭ tute detruitajn banejojn oni rekonstruis kaj malfermis ankaŭ novajn. El la nuntempe funkciantaj 47 banejoj 27 estas malfermitaj dum la tuta jaro kaj ilia frekventado multoble superas la antaŭmilitan. Jare proksimume 7 milionoj da vizitantoj — inter ili multaj eksterlandanoj — uzas niajn kuracbanejojn.

***

Budapeŝto estas ne nur la plej granda industria urbo, spirita centro de la lando, sed malgraŭ la malpliiĝo de la agrokulturaj terenoj, ĝi estas la plej granda urbo de nia lando rilate la agro-kooperativojn. En Budapeŝto — sur 11 500 hektaroj — mastrumadas 14 kooperativoj, kies havaĵo atingas unu miliardon da forintoj.

***

Dum la pli ol kvaronjarcento pasinta de post la liberiĝo la nacia enspezo — kvankam ne egalritme — fortoplene pliiĝis. En la dua duono de la 1960-aj jaroj kaj en la unua parto de la 1970-aj jaroj la nacia enspezo, kalkulate por unu persono, estis tri kaj duonobla de tiu de 1938. La realsalajro por unu persono hodiaŭ du- kaj duonoble superas tiun de la jaro 1938. La monata meznombra enspezo (salajro) de la lukrantoj en 1970 superis 2300 forintojn. La salajrojn en la diversaj laborterenoj karakterizas ekvilibro. Tamen inter la familioj kaj sociaj tavoloj troviĝas signifaj enspezaj diferencoj. La enspezo de la iom pli altnivelaj lukrantoj kvar-kvinoble superas tiun de la malaltnivelaj. La salajro de la intelektularo estas meze per unu triono pli granda ol tiu de la laboristoj.

***

En Budapeŝto hodiaŭ estas 16 teatroj kaj 159 filmteatroj. La hungaraj filmoj — kiuj sukcese rolas ankaŭ en internaciaj festivaloj — pretiĝas en kvar ĉefurbaj filmlaboratorioj. En Budapeŝto en la jaro 1971 la nombro de la radioabonantoj estis 633 miloj, la nombro de televidabonantoj estis 487 miloj.

panoramo

Pri Budapeŝto

La eksterlandanoj ĉiam volonte vizitis Budapeŝton, unu el la plej belsituaj urboj de la mondo. Krom la Balatona regiono Budapeŝto havas la plej viglan fremdultrafikon. 50 procentoj de la fremdultrafikaj enspezoj devenas el la valoroj de Budapeŝto.

La beleco, la grandurba medio, la etoso de agrablaj amuzejoj, la speciale hungara kuirarto de nia ĉefurbo ĉiam altiris multajn fremdulojn. La vizitantoj 33 procentojn de sia taga elspezo donas por manĝado kaj amuziĝo.

Budapeŝton vizitis en 1885 35 miloj, en 1922 70 miloj, en 1937 183 miloj, kaj en 1970 800 miloj da eksterlandanoj.

***

En Budapeŝto la pasaĝertrafiko de la amas-trafikiloj (tramo, trolebuso, aŭtobuso) inter la jaroj 1866 (tiam ekfunkciis la ĉeval-tramo) kaj 1973, de la jara 0,9 pliiĝis al 1300 milionoj Tiu ĉi lasta numero indikas, ke ĉiu ĉefurbano jare veturas per amas-trafikiloj sepcent-tridekfoje.

***

En Budapeŝto la tutan antaŭvideblan pasaĝer-trafikon laŭgrade transprenos la Metro: en 1973 (kiam konstruiĝos la tuta orienta-okcidenta veturlinio) 9,5 procentoj, en 1976 (ekfunkcios la norda-suda linio) 38,8 procentoj, en la jare 2000 (malfermiĝos nova linio en Sud-Buda kaj rekonstruiĝos la antaŭurbaj fervojo) 61,3 procentoj, kaj se estos preta la tuta Metroreto, 74 procentoj el la pasaĝeroj veturos per subtera fervojo.

***

(La rubriko de Panoramo de nia nuna numero estas kunmetita el la ĉi-jare aperinta libro: *Kion oni devas scii pri Budapeŝto?)*

La nova Budapeŝto





Panoramo el la supro de Parlamento

En nia lando nuntempe proksimume 30 procentoj de la krimfaroj okazas en Budapeŝto. Inter ili supernombras tiuj, kiuj direktiĝas kontraŭ posedaĵo. Kvankam la damaĝoj grandparte estas relative malgrandaj, tamen la tiaspecaj krimoj faras proksimume 65 procentojn de ĉiuj deliktoj. La krimojn, kiujn karakterizas perforto, damaĝfarado, pleje motivas: konscia primitiveco, malbonaj familiaj cirkonstancoj, senkultureco, organiza agado de la rekulpiĝemaj, harditaj krimuloj kaj la pli kaj pli disvastiĝanta alkoholismo.

***

La plej granda ekspoziciita objekto de la ĉi-jara Budapeŝta Internacia Foiro estis la 5 200 kvadratmetrojn ampleksa halo, planita kaj konstruita de la Entrepreno por Muntado kaj Konstruado por la Malpeza Industrio (KIPSZER). Ĉi tiu entrepreno okupas sin pri la konstruado de la nova „Foiro-Urbo" de Budapeŝto, kaj por la jaro 1974 ili transdonos tegmentitan ekspozicio-terenon de 23 000 m^2. En la Budapeŝta Internacia Foiro '74 jam pli modernaj ekspoziciejoj atendos la en- kaj eksterlandajn ekspoziciontojn en agrabla, malpli densa medio ol ĝis nun.

panoramo



Aquincum. Muzeo Romana meze de la ruinĝardeno

Jozefo Mátéffy:

Kelke da elstaraj arkitekturaj restaĵoj en Budapeŝto

Dank' al la modernaj trafikiloj, malgrandiĝis la geografiaj distancoj inter la diversaj mondpartoj kaj eble oni ne rigardos nin fantaziuloj, se ni riskas diri, ke baldaŭ venos la tempo, kiam ni matenmanĝos en Moskvo, tagmanĝos en Budapeŝto kaj vespermanĝos ekzemple en Novjorko. La ardan deziron vidi propraokule lokojn ekster niaj landlimoj, montras la grandskale kreskanta fremdultrafiko ĉie en la mondo. Ankaŭ Budapeŝton vizitas jare centmiloj el eksterlando. Ne malmulte troviĝas inter ili, kies scivolemon ne kontentigas supraĵa spektado de la vidindaĵoj en nia ĉefurbo, sed ilin interesas ankaŭ la historia paseo. Ili estas tiuj „ĝisostuloj", kiuj adresas al ni ekzemple jenajn demandojn: kie estas la plej malnova parto de via metropolo; kiam ĝi iĝis loĝloko, ĉu restis el ĝi io videbla por la hodiaŭo, kiuj estas la plej reprezentivaj memoraĵoj el la diversaj arkitekturaj epokoj.

Nu, la respondo — pro manko de spaco — ne estas facila. Tamen se vi volas jam anticipe orientiĝi, konsultu la volumojn de Hungara Vivo, kies pli ol 10 jarkolektoj donas al vi detalajn informojn pri niaj historiaj monumentoj kaj ĝeneralan sinoptikon koncerne nian tutan landon. Ni mencias ĉi-loke nur kelkajn artikolojn: pri „Pannonia" 1962/3, Burgmonto 1963/3, Renesanco 1965/1, Hungara konstruarto 1967/4, Baroko 1968/2, Artdefendo 1970/3, Islama arkitekturo ĉe ni 1972/1.

Turka banejo „Király" en Buda

Nun ni restu sur teritorio nur de nia ĉefurbo. La plej malnova parto de Budapeŝto troviĝas en ĝia IIIa distrikto (Óbuda=Malnova Buda). Tie situis antaŭ preskaŭ 2000 jaroj la fortikigita tendaro de romiana legio, kies tasko estis defendi la Danublimon kontraŭ la barbaroj loĝantaj inter la riveroj Danubo kaj Tibisko (Tisza). Norde de la tendaro situis la same fortikigita loĝloko de la civila loĝantaro kaj nomata eĉ hodiaŭ *Aquincum*. Ĝi estis ĉefloko en *Pannonia*, kiu lasta apartenis dum la unuaj jarcentoj laŭ nia erao al la *Roma Imperio*. La romianoj de alta civilizacio pretigis siajn konstruaĵojn temporeziste el ŝtonoj, ne mirinde do, ke iliaj restaĵoj eĉ hodiaŭ heroldas la altan gradon de mirinda konstuarto. *Óbuda* abundas je memoraĵoj el la romia epoko. Kiel unikaĵon ni mencias ke, laŭ nia scio, nenie aliloke en la Roma Imperio, eĉ ne en Romo mem, ekzistis samtempe du amfiteatroj, — male en la iama Aquincum estis granda amfiteatro por la soldatoj (vidu en Nagyszombat-strato) kaj dua amfiteatro, proksime al la nuna Muzeo Romiana, aparte por la civila loĝantaro. La muzeo de klasikisma stilo situas cetere sur tero de reprezentiva ruinĝardeno kaj estas plenŝtopita per diversaj romiaj memoraĵoj. Inter ili estas unika peco de hidro-orgeno (pli detale vidu H.V. 1967/3). En la ĝardeno troviĝas fundamentŝtonoj de kvin (!) publikaj kaj privataj romianaj banejoj, tiuj de domoj de riĉuloj, baziliko, Mithras-sanktejo, restaĵoj de subplanka hejtado (hipocaustum), mozaikplankoj ktp.

Post la kvarcent-jara romia regado sekvis duonmil-jara periodo de popolmigrado. Aperis plej diversaj triboj, gentoj, kiuj post pli-malpli da tempo malaperis en la fono de la historio. Ili ne lasis restaĵojn en nia ĉefurbo. Gravaj restaĵoj ankaŭ el la epoko de la *romanika stilo*, ĉefe el la XIIIa jc. troviĝas nuntempe en la provinco (vd. H.V. 1964/3), en Lébény, Ják, Zsámbék.

Elstara kolektejo de stilelementoj de *gotiko* estas nia Burgmonto. Parto de la fortikaĵmuroj, pordo- kaj fenestrokadroj el ŝtono kun gotikaj ornamaĵoj en la malgrandaj domoj, okulfrape multe da sidniĉoj de gotika

Pastoforio en la Internurba Preĝejo (1507)



karaktero en la pordegenirejoj devenas ĉiuj el la mezepoko. Reprezentiva estas la impona kavalirhalo nomata pri reĝo Sigmundo (1368—1437) kaj trovebla en la mezepoka Burgo (nun Historia Muzeo).

Same en Buda ni trovas turkajn restaĵojn. Ne multaj ili estas, ĉar post falo de la longa turka regado (1541—1686), la triumfantaj kristanoj rapide malaperigis laŭeble eĉ la spurojn de la amara paseo. Restis por ni en Buda, en kvar lokoj, banejpartoj kaj unu tombmonumento de *dervišo Gül* sur Rózsadomb (Rozomonteto). Vizitinda estas la turka banejo „Király" en la Fő utca (Ĉefa strato) kaj nomata laŭ ĝia iama posedanto. La grandan kupolon kaj partojn de la aliaj ĉeangulaj kupoloj oni siatempe ne detruis, sed kovris ilin per nova (baroka) tegmento. Dum jarcentoj kaŝiĝis tiamaniere la originalaj islamaj konstruelementoj ĝis nia tempo, kiam oni fakfidele restaŭris la valoran memorajon, kiu ĝis hodiaŭ restis funkcianta banejo.



Nacia Muzeo de klasikisma stilo

Kvankam pro la fremda subpremo nur malfrue, tamen alvenis la *baroka stilo* ankaŭ en nian landon. Ĝi floris ĉe ni ĉefe en la XVIIIa jc. Ankaŭ en Budapeŝto troviĝas pluraj originalaj barokaj preĝejoj. Plej belaj estas inter ili la preĝejo sankta Anna en Buda (H.V. 1961/2.) kaj la universitata preĝejo en la internurbo. Anstataŭ ili, tamen nia ĉiĉerono gvidos nin rigardi la Internurban preĝejon ĉe la Peŝta flanko de la moderna kabloponto Elizabeta. Kaj li havas kaŭzon por tio!. Starante kontraŭ la okcidenta (ĉefa) fronto, ni vidos duturan originalan barokan preĝejon kun karakteriza pordego, frontono, ŝtonvazoj kaj statuetoj. Ĉirkaŭirante maldekstren ni rimarkos surprizite, ke la malantaŭa duono de la preĝejo havas jam tute alian, nome gotikan stilon karakterizitan per longaj, ogivaj fenestroj, ŝtonornamaĵoj, gotikaj konzoloj. Same en la interno ni trovas gotikan sanktejon, ĉirkaŭireblan altaron, ogivajn sidniĉojn en la sanktejmuroj, kolorajn pentradrestaĵojn sur la kolonoj. Ĝuante la belaĵojn de la preĝejo, ni renkontos eĉ memorajojn de la *renesanca stilo,* respektive du belegajn pastoforiojn (marmorajn ciborio-tenujojn) el la jaro 1507. *Turka preĝoniĉo* en la dekstra muro de la sanktejo atentigas nin, ke ankaŭ la mahometanoj uzis siatempe tiun parton de la malnova kristana preĝejo kiel ĝamion, konvene al siaj religiaj pretendoj. Nun turnu vian atenton al la ĥorejo, al ties balustrado kaj al elformado de la centra navo, kaj vi ekkonos la stilsignojn de la *klasikismo.* Sed ni ankoraŭ ne finis! La fakuloj povas spekti en la suda turo originalajn murpartojn el a *romanika epoko* (1046), kaj en la subpreĝeja galerio, sur origina loko, la restaĵojn de iama ŝtonfortikaĵmuroj el la *romiana epoko* (296 laŭ nia erao).



Gotika sanktejo de Internurba preĝejo

Se ni devus elekti inter la plej elstaraj monumentoj de la *klasikismo* (stilo de reformperiodo daŭranta ĝis falo de nia liberecmilito en 1848), ni nepre prezentos al vi konstruaĵon de la Nacia Muzeo, plej signifan kreaĵon de fama arkitekto Mihaelo Pollack (1773—1855). Laŭ apreco de profesia arthistoriisto, la Nacia Muzeo „... estas la plej signifa enkorpigo de idea mondo de la reformperiodo kaj de la rapide evoluanta enlanda arto, plue ĝi estas ĝis nun nia plej grandioza publika konstruaĵo".

Nur dudek jarojn vivis ĉe ni (1845—1865) la stilo de *romantikismo,* kies elstara modelo estas la Peŝta Reduto kun orientaj motivoj.

Ĝis la fino de la pasinta jarcento daŭras la sekva periodo, la stilo de *eklektismo* (nova renesanco) inter kies kreaĵoj elleviĝas la Operdomo, poste la preĝejo Matiaso kaj la Fiŝista bastiono sur la Burgmonto, la Parlamentejo, la reĝa palaco iama, la Nacia Galerio, Belarta Muzeo, Artgalerio, se mencii nur la plej renomajn kaj reprezentivajn artmonumentojn de nia ĉefurbo Budapeŝto.

Leó Szilárd

Raporto el la Centra Stacidomo

(Leó Szilárd estas hungara scienculo, kiu vivis en Usono kaj mortis en 1964. Rezulte de lia instigo prezidento Roosevelt donis instrukcion ellabori la Usonan atombombon. En 1942 en Chicago kune kun Enrico Fermi li travivis la historiajn minutojn, kiam la atoma ŝtiparo ekfunkciis. Antaŭ la apliko de la atombombo en Hiroŝimo li organizis la proteston de la scienculoj kontraŭ ĝia utiligo en la milito. Li firme opiniis kaj konfesis, ke la atingojn de la scienco oni devas utiligi por pacaj, ne por militaj celoj. La suban sciencfikcian rakonton li verkis en 1948.)

Vi povas imagi, kiom ni konsterniĝis kiam surgrundiĝinte ni renkontis senhomiĝintan urbon. Dek jarojn ni veturis tra la spaco, senpaciencaj kaj incititaj pro la deviga nenifarado, kaj kiam fine ni alvenis sur la Tero, evidentiĝis — kiel sendube vi jam estas informitaj pri tio — ke ĉia vivo estas elmortinta sur tiu planedo.

Kompreneble, nia unua tasko estis ekscii, kiel okazis tio, kaj esplori, se necese, eĉ riskante nian vivon, ĉu tiu forto, eksterminta la vivon, kio ajn ĝi estis, efikas ankoraŭ aŭ ne. Tio ne signifas, ke ni povus fari multon por protekti nin, sed ni devis decidi, ĉu ni petu sendadon de pluaj ekspedicioj al tiu ĉi teritorio, aŭ ni forkonsilu ilin de tie ĉi.

Unue ni supozis troviĝi antaŭ nesolvebla mistero. Kiel povis ekstermi ia ajn viruso aŭ bakterio ĉian vegetaĵon kaj ĉiun beston? Sed apenaŭ pasis semajno, kiam unu el niaj fizikistoj — tute hazarde — malkovris nefortan radioaktivecon en la aero. Estante tre malforta, per si mem ĝi ne havus grandan signifon, ĝia analizo montris, ke ĝi devenas el speciala miksaĵo de pluraj diversaj radioaktivaj elementoj.

Tiam Xram ekmemoris, ke antaŭ ĉirkaŭ kvin jaroj oni notis diversajn ekbrilojn sur la Tero (ĉiujn dum ne pli ol semajno). Li ekhavis la ideon, ke tiuj ekbriloj povis deveni eble de uranieksplodoj, kaj la nuna radioaktiveco eventuale estas la postsekvo de tiuj eksplodoj de antaŭ kvin jaroj; komence ĝi povis esti sufiĉe forta por ekstermi ĉian vivon sur la planedo.

Tamen, tiu ĉi teorio ŝajnis ne tre verŝajna, ĉar la uranio ne eksplodas per si mem, kaj oni bezonas apliki komplikan procedon por fari ĝin eksplodigebla. Ĉar la teranoj, konstruintoj de tiuj ĉi urboj, sendube estis inteligentaj estaĵoj, estas malfacile supozi, ke ili preparis izotopon de uranio kun tiom da klopodoj sole por ekstermi sin mem.

Sed la pluaj esploroj pruvis, ke la radioaktivaj elementoj, trovitaj en la aero, plene identas kun tiuj, kiuj kreiĝas rezulte de la eksplodo de la uranio, kaj estas miksitaj en tia proporcio, ke ĝi povas esti la produkto de uranieksplodo de antaŭ kvin jaroj. Tio jam nur malfacile povus esti hazarda koincido, kaj pro tio ĝis tiu ĉi punkto oni ĝenerale akceptas la teorion de Xram.

Sed kiam li daŭrigas, klopodante klarigi, kial kaj kiel povis okazi tia uranieksplodo, mi ne plu kapablas sekvi lian rezonadon. Xram supozas, ke verŝajne okazis milito inter la loĝantoj de la du kontinentoj, en kiu venkis ambaŭ partioj. Estas fakto, ke la unuaj dudek ekbriloj estis notitaj sur la kontinento dekstre de la pli malgranda oceano, kaj ilin sekvis kvin (multe pli fortaj) ekbriloj sur la kontinento maldekstre de tiu oceano, tial unuafoje mi emis serioze, esence konsideri la milito-teorion.

Mi pensis, ke eble vivis du diversaj rasoj de teranoj sur la du kontinentoj, kaj ili ne povis aŭ ne volis limigi la naskonombron, kio siavice povis konduki al tromultiĝo, manko de nutraĵoj kaj vivbatalo inter la du rasoj. Sed mi devis rezigni pri tiu teorio, ĉar mi trovis min antaŭ du faktoj: 1. la skeletoj de la teranoj, trovitaj sur ambaŭ kontinentoj, apartenis al la sama raso; 2. laŭ la statistiko de skeletoj en neniu kontinento tromultiĝis la loĝantaro.

Malgraŭ tio, Xram ŝajne persistas ĉe sia milito-teorio. Plej malagrable estas, ke nun li bazas ĉiun sian argumenton sur sola observo tre verŝajne sensignifa, kiun antaŭ nelonge ni faris dum ekzamenado de la Centra Stacidomo.

Kiam ni surgrundiĝis, mi ne sciis, kie komenci la esploradon, kaj trafe-maltrafe ni elektis unu el la plej grandaj konstruajoj de la urbo. Ni ne scias, kion signifas ĝia surskribita nomo „Centra Stacidomo", sed apenaŭ oni povus dubi pri ĝia destiniteco. Ĝi apartenis al primitiva transporta sistemo, bazita sur stultformaj maŝinegoj, kiuj kuris sur reloj, kaj tiris post si vagonojn, konstruitajn sur radoj.

Ni okupis nin pli ol dek tagojn pri la studado de la konstruaĵo, kaj ni malkovris tre multajn interesajn kaj kuriozajn detalojn.

Mi volas komenci per unu esploro, kiun — almenaŭ miaopinie — ni sukcesis klarigi kontentige. Sur tiuj vagonoj, tenataj en la stacidomo, pendis tabuloj: „Por fumantoj" aŭ „Por nefumantoj", demonstrante klare, ke ekzistis iaspeca diskriminacio inter la pasaĝeroj. Tuj mi ekhavis la ideon, ke probable du specoj de teranoj vivis en tiu urbo, eble unu pli multe

pigmentita varianto, kun pli malhela vizaĝkoloro, kaj alia malpli kolorita (kvankam ne nepre *albiona)*, kun hela vizaĝkoloro.

El la teranoj ni trovis nur skeletojn, kaj per ili ni sukcesis malkovri nenion pri ilia haŭtkoloro. Pro tio unue ŝajnis, ke estos malfacile trovi pruvon por tiu ĉi teorio. Sed intertempe ni trovis en la urbo kelkajn sufiĉe grandajn konstruaĵojn kun nekonata celo. Sur la internaj muroj de tiuj konstruaĵoj pendis enkadritaj, pentritaj toloj, kiuj prezentis pejzaĝojn kaj figurojn de teranoj. Kaj ĉi tie jam evidentiĝis, ke la teranoj dividiĝis je du grupoj: je tiuj, kies vizaĝkoloro estis forte pigmentita (fumantoj), kaj je tiuj, kies vizaĝo apenaŭ estis kolorita (nefumantoj). Tio precize kongruis kun niaj supozoj.

Eble ĉi tie mi menciu, ke kelkaj procentoj de la bildoj prezentas trian varianton de la teranoj. Tiu varianto, krom paro da manoj kaj piedoj, havis ankaŭ paron da flugiloj, kaj evidente ili ĉiuj apartenis al la malpli pigmentita varianto. Inter la ĝis nun ekzamenitaj multnombraj skeletoj neniu apartenis al la flugilhava grupo, tial, mi konkludis, temas pri bildoj de de ia elmortinta varianto. Pri la gusteco de mia konkludo jam neniel oni povas dubi, ĉar ni konstatis, ke la flugilhavaj figuroj aperas konsiderinde pli ofte sur la malnovaj pentraĵoj, ol sur la novaj.

Kompreneble mi ne povas priskribi por vi ĉiujn tiujn malkovrojn, kiujn ni faris en la ejoj de la „Centra Stacidomo", sed mi volus rakonti almenaŭ la plej kuriozan, tiom pli, ĉar Xram bazas sur ĝi sian milito-teorion.

La malkovro rezultis el sensignifa detalesploro. Sur la grandega teritorio de la „Centra Stacidomo" ni atingis du malpli grandajn salonojn, kiuj situis en kelke kaŝita loko. En ambaŭ salonoj (kun surskriboj „Viroj", respektive „Virinoj"), ni trovis multajn malgrandajn ĉelojn, kiuj servis kiel kaŝlokoj, kie la teranoj povis el si eligi la elskrementojn. Ni rimarkis, ke la pordo de ĉiu ĉelo estas fermita per ruza aparato. Post la ekzameno de la aparatoj klariĝis, ke ili enhavas multajn metalajn disketojn. Nun ni jam scias, ke tiuj lerte faritaj malgrandaj aparatoj malhelpis ĉian eniron en la ĉelojn ĝis oni ĵetis novan disketon tra la aperturo; en tiu momento la pordo malfermiĝis kaj ebligis la eniron en la ĉelon.

Sur la disketoj troviĝis ankaŭ diversaj figuroj kaj surskriboj, sed sur ĉiuj aperis la vorto „Libereco". Kin signifas tiuj aparatoj, en ili la disketoj, kaj sur la disketoj la vorto „Libereco"?

Kvankam oni prezentis plurajn teoriojn, la ĝenerala opinio ŝajnas preferi tiun, laŭ kiu ĉi tie temas pri solena rito akompananta la procedon de la senŝarĝiĝado, eble simila al la strangaj solenaĵoj, raportitaj el la planedoj Sigma 25 kaj Sigma 43. Laŭ tiu supozo „Libereco" estis ia virto, tre honorita fare de la prauloj de la teranoj. Tiel ni ricevas sufiĉe kontentigan klarigon koncerne la oferon de la disketoj, tuj antaŭ la ago de la senŝarĝiĝo.

Sed kial oni bezonis certigi (aŭ, kiel Xram diras, devigi) per ruza aparato, ke oni fakte oferu la disketon en ĉiu unuopa kazo? Ankaŭ tiu ci demando estas respondebla, se ni supozas, ke la teranoj, alproksimiĝinte al la kajutoj, estis pelataj de iaspeca sento de angoro, kaj tial sen la aparato foje-foje ili forgesus pri la ofero de la disketoj, kaj rezulte de tio ili poste suferus de konsciencaj turmentoj.

Mi pensas, ke tio ĉi estas la plej bona klarigo, kiun oni povas doni, kaj estas verŝajne, ke la pluaj esploroj konfirmos tiun ĉi koncepton. Sed kiel mi jam rimarkis, Xram havas apartan teorion, kaj li supozas, ke ĝi klarigas ĉion: la disketojn en la aparato, kaj samtempe ankaŭ la uranieksplodon, kiu ekstermis la vivon.

Li imagas, ke tiujn disketojn la teranoj ricevis rekompence por servoj. Li diras plue, ke la teranoj ne estis inteligentaj estaĵoj, kaj ili ne laborus en la komunaj entreprenoj sen speciala instigo.

Laŭ li per tio, ke la teranoj estis ĉiuokaze malhelpataj en la demeto de sia ekskremento, antaŭ ol ili oferis la disketon, ili estis devigitaj klopodegi por akiri tiajn disketojn. Ĉi tiu akiremo igis ilin partopreni en komunaj fortostreĉoj, kio siavice estis necesa por la funkciigo de la socio.

Li supozas, ke la disketoj, trovitaj en la deponejoj, estas nur unu el la manifestiĝoj de ĝenerala principo, kaj la teranoj tre verŝajne devis cedi tiajn disketojn ne sole ĉe la eniro en la malŝarĝejon, sed ankaŭ tiam, se ili volis ricevi nutraĵon.

Antaŭ kelkaj tagoj Xram vizitis min por rakonti al mi ĉion ĉi: mi ne certas, ke mi komprenis ĉion el lia parolo, ĉar li parolis tre rapide, kiel kutime, se iu lia teorio lin entuziasmigas. Sed la ĝeneralajn konturojn de liaj imagoj mi komprenis, kaj ne trovas ĝin sufiĉe logika.

Ŝajne li faris ian komplikan kalkulon, kaj laŭ ĝi, la produktado kaj distribuado la vivnecesaĵoj baze de la disket-sistemo probable ne estis stabila, kaj laŭnecese ĝi suferis ŝanceliĝojn, kiuj certagrade memorigas pri la maniaj-depresiaj cikloj de la frenezuloj. Eĉ, li tiras el ĉio ĉi la konkludon, ke en depresia periodo la milito psikologie estis ebla eĉ interne de la sama raso.

Neniu pli ol mi pretas rekoni, ke Xram havas brilan intelekton. Kvankam liaj teorioj ĉiam montriĝis eraraj, ĝis nun ĉiuokaze ili enhavis ankaŭ eron de la vero. En la nuna teorio tiu ero povas esti nur vere tre malgranda, eĉ, nun mi havas la eblon demonstri, ke li eraras plene.

Temas pri tio, ke en la lastaj tagoj prove ni ekzamenis en la urbo dek loĝdomojn. Ankaŭ en ili ni trovis aron da malŝarĝejoj, sed en neniu ni trovis aparatojn kun disketoj, almenaŭ ĝis nun.

Nun jam ŝajnas tute certa la supozo, ke la disketojn, trovitajn en la „Centra Stacidomo", oni metis dum ceremonio. Estas evidente, ke tiuj ceremonioj okazis senescepte nur ĉe malŝarĝiĝo en publika loko.

Mi tre ĝojas, ke ni sukcesis klarigi ĉion ĉi ankoraŭ ĝustatempe, ĉar mi estus ege bedaŭrinta, se Xram sin ridindigus, preninte sian teorion en la raporton. Li estas talenta junulo, kaj malgraŭ liaj harstarigaj teorioj, kiujn li kapablas konstrui dum minutoj, mi ne malmulte lin ŝatas.

Tradukis V. BENCZIK

Mihály Ladányi

Sen ekstazo

Kafejo,
vi 'stas mia patrio kaj nun jam mia sola hejmo,
inter la kalvaj hebreoj de Chagall,
kiuj restis viaj en la kavoj de la milito,
inter sendentaj oldulinoj,
jam antaŭlonge forgesintaj
la varmajn manoplatojn,
kaj inter la sovaĝaj
ciganaj stratulinoj,
kiuj mian triston
premas al sia vizaĝo kiel mancn,
kafejo,
fumanta tombokavo,
inter la implikaĵoj de la gazetoj
mi en vi kaŝiĝas, fabelu pri io alia,
per rido leĝera kovru
mian jelpadon amaran.

Sed, kafejo,
ŝipo ruliĝanta,
tra viaj juntoj
enfluas la griza amaro.

La unuokula gazetvendisto ĉirkaŭiras la tablojn,
60 heleroj
por la hodiaŭvespera nervospasmo kaj strata akcidento,
por tiom la mondo garantias,
ke en via fuma sino mi povas vivi grize,
sen sovaĝa ekstazo.

La unuokula gazet-kriisto estas kontenta pri la hodiaŭ.
Ĝi estis plena de eventoj,
do la gazetoj ree vendiĝas,
Profumo-afero-, trajno-prirabo en Anglujo:
ĉio ĉi varmigas gazet-kriistan koron,
ĉio ĉi bobelas supren inter la tabloj,
kaj la tabloj ŝvebas
dormeme en ĉi griza suko,
kaj ĉi griza suko
inundas ĉiutage la mondon.

La malsato-statistiko de UNESKO ne estas evento ĉi-tempe,
ĉar la Profumo-afero,
trajno-prirabo en Anglujo kaj la ceteraj,
jen estas nun la ŝikaj.
Kio okazis al nia cerbo,
ke ĉi tion ĝi voras,
ne la malesperon de la poetoj,
ne la hurlon,
kiu gluglas el la gorĝo de la disfalonta mondo?
Morgaŭ konsola ridrikan' de aktorinoj
nin alaplaŭdos el la magazinoj, siavice
la tago sur nia kubuto
ankaŭ hodiaŭ ĉifoniĝis.

Kafejo,
la nikela bovino
kun dismetitaj kruroj
staraĉas sur tablo bufeda,
el ĝia mamo
nigre fluetas la ekscito.

Tr. K. KALOCSAY



Péter Kuczka

Domoj, stratoj, placoj,

Petőfi ĉambron en ĉi domo luis,
kaj tie Arany sub la kverkoj revis,
Attila József en ĉi domo ĝuis
feliĉon aŭ tre malfeliĉi devis.

Ĉi strato vidis popol-tumultadon,
sur ŝtonoj dormis homo labormanka,
kaj prenis ŝtonojn formi barikadon,
oni lin pafis en la Ĵaŭdo Sanga.

Ĉi-place rozoj balanciĝis pompe,
kaj tie: cent loĝejoj de mizer'.
Tie la pont' en akvon falis rompe,
Jen, tie min atingis la Liber'.

La Neu-Gebäude restis nur memore;
praavo tie mortis de pafil'.
Jen la klinik': tie mi koridore
atendis, ĉu filin' estos aŭ fil'.

Tr.: *M. FEJES*

J. Arany *(1817—1882) kaj* Attila József *(1905—1937) du grandaj poetoj hungaraj.* Neu Gebäude *(Nova Konstruaĵo) estis grandega kazerno konstruigita en 1786. Post la falo de la hungara libermilito ĝi estis uzata kiel kazerno; plurajn „ribelulojn" oni tie ekzekutis, ankaŭ grafon Batthányi, ministroprezidanton de la revolucia registaro. Oni ĝin detruis en 1898. Sur ĝia loko nun staras Placo de Libero.*

Lajos Tárkony

MIA

Ho, mia naskiĝurbo, vi, mia viv-orbito,
nun, kiam mi vin kantas, striktiĝas mia veŝto,
ho, milkolora urbo de sprito, de spirito,
de varmaj akvoj, varmaj humoroj, Budapeŝto!

Gaje mi migris kiel pantaloneta bubo
sur vojoj kaj sur rokoj de via mont' Gerarda,
kaj de sur ĝia supro mi gapis pri Danubo,
pri ĝia blond' lulata kaj pri l' insul' smeralda.

En la Iduoj Martaj jam en matena fruo
mi, vigla knabo, kuris al la Petőfi-placo,
florkronoj buntis tie sur la poet-statuo,
min banis la sunlumo: printemp-ĉiela graco.

Multfoje min altiris Bulvardo de Muzeo:
en posttagmezoj tie scivole mi promenis
preter montrofenestroj, kaj estis elizeo
rigardi tiajn, kiuj de libroj bunte plenis.

Arnold Gross: La urbo, Budapeŝto de la blua sonĝo

BUDAPEŜTO

Survoje al naĝejo haltadis mi por gapo
pri ŝipoj kaj pri mevoj sur pont' Elizabeta,
en krepuskhoroj dolĉis kis-revo, kis-agapo
sur benkoj de l' amŝirma insulo Margareta.

Vertiĝan de la svarmo de homoj kaj de ĉaroj,
olda kvartal' min logis per paco de strateto,
aŭ inter Buda-montoj zumantaj de arbaroj
atendis min dimanĉoj kantindaj per soneto.

Post jaroj murdaj, kiuj restigis min soleca,
fermiĝis ja korvundoj, sed restis la cikatroj:
unuan de novembro funebro senforgesa.
Ĉi tien min alligas la tombo de l' gepatroj.

Kaj venis jar' terura, monatoj de frenezo,
prirabo kaj masakroj de la viktimoj veaj,
kelvivo, stratbatalo, ĝis en la urbomezo
fermiĝis la ŝtalringo de trupoj ruĝarmeaj.

Vidinte viajn brulojn sub bomboj senindulgaj
kaj viajn pontojn fali per eksplodig' latrona,
mi vidis rekreiĝi el la ruinoj fulgaj
la domojn, pontojn, Burgon kun la palaco krona.

Kie buldoz' balais kadukajn domojn grupe
kaj en ĉirkaŭo via stariĝas domoj salte,
en tia via parto mi vivas, loĝ-okupe
en mil-etaĝa domo, unu etaĝon alte.

Ho Budapeŝt' pli granda, pli bela kaj pli brua,
kun labirint' moviĝa de via aŭtosvarmo,
ja vin ne pereigos la monda mod' detrua,
beton-dezert' neniam fariĝos via ĉarmo.

Mi kantas do proksime al tiu vojo-kurbo,
post kiu jam finiĝos al mi la vivo-krozo,
ke estis vi kaj estos por mi, ho mia urbo,
naskiĝo kaj vivbrulo, paciĝ' kaj forripozo.

Zsolt Gyarmathy

Johano Bólyai kaj la lingvo

Johano Bólyai estas unu el la plej interesaj figuroj de la hungara scienchistorio. La patro — Farkas Bólyai — estis genia matematikisto de sia tempo, li estis amiko de Gauss. Fidele al la 19-a jarcenta genio-idealo, sian filon li konscie edukis matematikisto. Johano Bólyai fariĝis milit-inĝeniero en Vieno, kaj li estis nur 21 jara, kiam li sukcesis solvi la problemon de la XI-a aksiomo Euklida, per kio laŭ liaj vortoj: „Mi kreis el nenio novan, alian mondon." Inter la patro kaj filo, malgraŭ la reciproka amo kaj honoro, ekestis neforigebla konflikto, kiu eĉ pliprofundiĝis tiam, kiam Gauss ne taksis laŭ la merito la malkovron de Johano Bólyai.

La konflikto inter la patro kaj la filo, la nerekono en la scienca vivo igis Johanon Bólyai vivi en preskaŭ plena izoliteco. Post lia morto oni trovis grandegan kvanton da manuskriptoj, kies studado muntempe okazas en Marosvásárhely, en la nuna Rumanio.

Bólyai en la tuta izoliteco senorde surpaperigis siajn plej sekretajn pensojn. Dum la jaroj el tiuj pensoj kristaliĝis la granda plano; verki ampleksan enciklopedion, kiu servus kiel gvidilo por la plibonigo de la mondo. Li kredis la forton de la racio, kiu povas formi la mondon pli logika, bona, kaj tiu racia mondo estos la bazo de la homa harmonio korpa kaj anima. Li rimarkis, ke la lingvo estas unu el la plejaj mallogikaĵoj; tial li komencis esplori la lingvon. Sciante kelkajn lingvojn, li rimarkis surprizite, ke la lingvaj esprimoj ne estas tiel klaraj kiel la matematikaj signoj. Kiel tre precizan scienculon lin malhelpis la lingvaj malprecizaĵoj en sia laboro.

Tiutempe komenciĝis liaj prilingvaj esploroj. Li sukcesis konstati, ke la lingvo estas signo-sistemo. La signoj estas produktaĵoj de la homa menso, kaj la fenomeno mem ekzistas sendepende de la signo. Scienco servanta la homan progreson bezonas perfektan lingvon, kiu ankoraŭ ne ekzistas, sed estas kreebla. Tiu lingvo devas esti matematike perfekta, nuancita. Bólyai komencis esplori la hungaran lingvon, ĉar la hungara lingvo ne estas disfalinta en dialektojn. Li perceptis, ke la evoluantaj konoj bezonas novajn esprimojn, kiujn, se ilin ne havas la hungara, oni devas transpreni el aliaj naciaj lingvoj — post asimiligo. „Tiu asimiligo povas esti klara ĉe aliaj eminentaj nacioj, kaj ĉiu alproksimiĝo estos pli rapide atingita al unu komuna lingvo sur la terglobo."

Jam lia patro menciis la bezonon de komuna lingvo en sia verko *Testamen:* „Multe helpus la delonge dezirita unueca lingvo, ĉu pretigita per matematikema kaj muzikema animo, ĉu farita kiel komuna lingvo el unu el la jam ekzistantaj . . . tiel neniu devus l[illegible] du lingvojn; unua estus la hejma lingvo, la dua, per kiu ĉiu nacio povus interkompreniĝi." Estas tre interese, ke la pliriĉiĝon de la lingvo Johano Bólyai taksas kiel negativan fenomenon, ĉar perdiĝas la klereco, logiko dum la riĉiĝo. Laŭ li la homaro havis iam komunan lingvon nemiskompreneblan, kiu similis al la matematiko. (Tiun fiktivan lingvon li nomis *geber.)* La tasko do estas, ke la naciajn lingvojn oni devas rekonduki al tiu nemiskompreneblecо, kaj krei komunan lingvon. La menciitan nemiskompreneblecon li intencis atingi per la aplika uzo de radikvortoj. En la unua duono de la pasinta jarcento estis tre moda lingvistika koncepto la radikvortteorio, — nuntempe en tia formo nur scienca kuriozaĵo. Johano Bólyai estis tre fervora adepto de tiu koncepto, simile al aliaj eminentaj scienculoj, verkistoj. Bólyai esperis, ke surbaze de la hungara lingvo li povas ellabori radikvortaron, kaj helpe de tio uzante la analogion de la matematikaj signoj li scios krei artefaritan lingvon. Liaopinie, tiu artefarita lingvo devas havi difinitan vortostokon vastigeblan, se tion postulos la sciencoj kaj la evoluo-rapido de la pensado; kaj malmulte da rilatigaj elementoj. Li estis konvinkita, ke la lingvo entenas leĝojn esprimeblajn per matematikaj formuloj.

En gramatikaj demandoj li intencis validigi ankaŭ la vortradikan koncepton. La tutan gramatikan sistemon li volis simpligi kiel ian superfluaĵon. Ekzemple, en la konjugacio li nur rekonis la indikativon.

Johano Bólyai ne pretigis sian planitan mondolingvon. Nur estas pretaj kelkaj vortolistoj, kiujn ankoraŭ oni ne publikigis. Sed li kredis, ke ekkonante la puran logikecon, elproprigeblecon de la lingvo, oni tuj ekŝatos kaj komencos ĝin paroli.

Li ne rimarkis, ke la lingvo obeas al aliaj leĝoj, ol la matematiko. Sed estas fakto, ke Johano Bólyai estis la unua scienculo, kiu per modernaj, matematikaj konoj provis esplori la lingvon, kaj tial oni diras, ke Bólyai estis unu el la fondintoj de la matematika lingvistiko. Bedaŭrinde pro la izoliteco li restis ekster la ĉefdirekto de la sciencoevoluo, kaj lia agado ĉefa en sia maljunaĝo estis nur flankvojo, spicita per kelkaj kuriozaĵoj.

Al la esperantistoj kelkaj ideoj de J. Bólyai estas tre simpatiaj, ĉar la opinioj de li kaj lia patro estas tre proksimaj al tiuj, kiujn klopodis Zamenhof solvi en Esperanto. Bedaŭrinde la nunaj esploristoj ankoraŭ ne trastudis la ideojn de Bólyai pri la planita mondolingvo. Sed tamen, tiu laboro rezultigis, ke nun ni rigardas Johanon Bólyai kiel unu el la malkovranto de la hipotezo pri informacio.

Ing. Miklós Gádoros

Tajdo en karsto

Laŭ novaj esploroj ne nur la maroj, sed ankaŭ la subtera karstakvo havas tajdon.

La Karstesplora Stacio fondita de prof-ro Ferenc Papp en 1957 en Jósvafő, Nordhungarujo, havas la taskon observi kaj esplori la karstajn fenomenojn en la ĉirkaŭaĵo. Tiel la esploristoj de la Stacio observas ankaŭ la fontojn proksimajn. Du el tiuj fontoj (Nagytohonya kaj Lófej) montras tre interesajn, ne laŭveterajn pliabundiĝojn, plurfoje en semajno: la akvodebito (akvokvanto porsekunda) subite signife kreskas, kaj post kelkaj horoj ĝi denove ekhavas la antaŭan mezuron. La detala analizo de la abundiĝoj, farita de *László Maucha*, estro de la Stacio, elmontris, ke la fenomeno estas klarigebla per subtera sifona funkciado. Sed la statistiko pri la komencoj montris ankaŭ, ke 30% el la abundiĝoj komenciĝis je la 6-a, 12-a, 18-a aŭ 24-a horo (± 30 min.), kvankam tiuj 4 horoj estas nur 17% de la tago. Tiu surpriza fakto donis la ideon pri luna-suna influo. Vere, la analizo laŭ la tajda tempo (kiu nur je nova kaj plena lunoj egalas kun la suna tempo) pruvis, ke la interrilato inter la abundiĝoj kaj la tajdo estas signifika.

Mem la pliabundiĝo ne povas esti tajdo: ĝi estas tro granda. En la naturo eĉ grandaj lagoj ne montras tajdon. Kiamaniere havas do tajdon la karstakvo, kiu troviĝas nur en la breĉaro de la karstaj montoj? La dimensioj de la karstaj montaroj estas tro malgrandaj kaj la bremsa forto en la maldikaj breĉoj estas tro granda, por ke la lunaj-sunaj fortoj povu observeble movi la karstakvon. Vere, sed la solida terkrusto mem havas tajdon de 30—40 cm-oj. Tio signifas, ke laŭ la tajdo ŝanĝiĝas ankaŭ la dimensioj de la tersurfaco. Tiu movo influas la dimensiojn de la breĉoj entenantaj akvon.

La breĉomovojn la esploristoj sukcesis demonstri. Apud la Stacio troviĝas la groto *Imre Vass*. En tiu groto multo estas observita: debito de la gutanta akvo, temperaturo de la grota aero ktp. En la groto oni aranĝis mezurejon unue kun mekanikaj mezuriloj, kiuj montris la relativajn movojn de la grotaj muroj kun 1 mikrono da akurateco laŭ tri direktoj (N-S laŭlonge de la grota koridoro, krome laŭlarĝe de la koridoro kaj vertikale). Dum 7 tagoj (17—24. aug. 1966.) la mezuriloj estis legataj en ĉiu 10-a minuto, kaj oni konstatis, ke la koridoro periode kunpremiĝas kaj relarĝiĝas 2—3 mikronojn. (Estis interese, ke dum la observa periodo granda tertremo okazis en Turkio; la alveno de la tertremaj ondoj kaŭzis provizoran kunpremiĝon de 6 mikronoj kaj daŭran forgliton vertikalan de 5 mikronoj inter la muroj de la koridoro.)

Ekkoninte la ordon de grandeco de la movoj, por permanente observi la fenomenon, oni konstruis elektran mezuraparaton kiu sensas en tri direktoj la movojn de la muroj en la groto (kie la temperaturo influanta la mezurilon ne ŝanĝiĝas) kaj registras ilin en 10.000-obla pligrandigo en la laboratorio de la Stacio, 500 metrojn for de la sensilejo. Samtempe oni muntis tertremo-registrilon, kaj pli sensivajn registrilojn por la akvodebito-mezurado.

La samtempaj registradoj de la petromovo kaj de la akvodebito ebligis konstati, ke mem la debito montras tajdajn ondojn. La sifonoj, kiuj antaŭ plibundiĝoj estas tre sensivaj, pligrandigas la ondojn kiel hidraŭlikaj relajsoj. La novartaj observiloj donas eblon pli bone kaj plimultflanke ekkoni la movojn de la karstakvo kaj trovi novajn rilatojn inter la hidrologio, la geofoziko kaj la kosmografio.



Instrumentoj muntitaj en groto por mezuri la tajdokaŭzitan variadon de ĝiaj dimensioj

Fondiĝo de HESL antaŭ 60 jaroj

La Esperanto-movado en la etapo 1905—1917 diferenciĝis politike: apartiĝis kaj memstariĝis la laborista E-movado. En Hungario la studento *Zoltán Baranyai* estis la unua E-isto, kiu kontaktiĝis kun eksterlandaj laboristoj-esperantistoj kaj en 1907 fariĝis Hungaria korespondanto de la tiam ekiranta socialisma *Internacia Socia Revuo*, eldonita de Parizaj laboristoj-esperantistoj. Ofte aperis en ĝi liaj sciigoj pri la kontraŭmilitaj kaj balotrajtaj luktoj de la Hungaria laborista movado. Tiel same en 1907 ekkonis E-on *dro Jozefo Madzsar*, dentkuracisto, eminentulo de la hungara laborista movado. Li organizis nialande la laboristan kontraŭalkoholan movadon, poste fariĝis prezidanto de la Kontraŭalkohola Laborista Asocio. Lia persono multe kontribuis al tio, ke en la 20-aj jaroj la kontraŭalkohola kaj esperantista laboristaj movadoj plej strikte kunlaboris, kaj ambaŭ apartenis al la maldekstra opozicio de Socialdemkratia Partio, plej dekstra tia partio en Eŭropo.

En 1907 okazis ankaŭ la unuaj kursoj por laboristoj en Budapeŝto. Aŭtune *Aŭgusto Marich*, redaktoro de la monata E-revuo *La Verda Standardo* gvidis kurson en la centro de *Landa Asocio por Hungariaj Terlaboristoj;* ĉi tiu socialista asocio de la agrar-proletaro fondiĝis unu jaron antaŭe. Marich poste metis anoncojn en la socialisma ĵurnalo *Népszava* kaj ankaŭ en la fakorgano de la bindistoj.

En 1907 fondiĝis ankaŭ *Hungara Esperantista Studentgrupo* kun socialisma tendenco. Kiam en Oktobro oni inaŭguris la Gutenberghejmon de la presista sindikato, la prezidanto de la studentgrupo, *Karlo Mezei*, tuj kaptis la okazon por fari propagandan prelegon kaj poste kurson por presistoj.

De 1908 ofte aperis artikoloj por-E-aj en *Társadalmi Forradalom* (Socia Revolucio),organo de anarkistoj, sed la anarkistaro estis nur tre eta grupo. Certe pli efika estis artikolo de *dro Roberto Schatz* en la *Szocializmus* (1909), socialdemokratia teoria revuo.

En la urbo *Debrecen* E-kursojn por konstrulaboristoj kaj fervojistoj iniciatis kaj gvidis (1908—1909) *Rudolfo Rajczy*, posta martiro de la hungara komunisma movado.

Ĉiuj ĉi iniciatoj, kune kun la pli kaj pli vigla propagando de la burĝaj E-istoj rezultigis, ke unuopaj laboristoj lernis E-on. Tiuj unuopuloj, en aprilo de 1910, fondis en Budapeŝto la unuan laboristan E-istan grupon *Laboro*. La celo de la grupo estis organizi senpagajn kursojn por la laboristaro. Efektive ĝi sukcesis organizi kelkajn en laboristaj distriktoj kaj antaŭurboj, kaj aŭtune jam funkciis la laborista grupo *Espero*.

En Septembro de 1910 aperis la bonega lernolibro de *Johano Medgyesi*, eminenta pedagogo, la unua prezidanto de la grupo *Laboro*. Tiu unua hungara E-lernolibro „por la junularo kaj la laborista klaso" uzis naturajn parol-situaciojn, vivproksimajn tekstojn kaj bone elektitan vorto-stokon. Medgyesi, per la laborista movado, fariĝis socialisto, poste socialdemokratia gvidanto en sia naskiĝurbo *Hódmezővásárhely*.

De 1912 multe agadis inter la laboristaro *Paŭlo Robicsek*, la tiama redaktoro de *La Verda Standardo*. Ankaŭ li pere de E-o fariĝis socialisto, poste sindikata gvidanto, eĉ popolkomisaro dum la Konsilia Respubliko.

Samjare komencis propagandi inter la presistoj *Izidoro Polgár*, presisto reveninta el Parizo. Li volis fondi *Federacion Internacian de la Laborista E-istaro*, sed malsukcesis, sekve la plej aktivaj E-istaj laboristoj trovis, ke pleje taŭgas organiziĝi en landa kadro. La *23-an de februaro 1913* kelkdekoj da ili fondis en Budapeŝto la organizon *Hungaria E-ista Societo Laborista* kaj tio donis fortan puŝon al la plua evoluo. Jarfine la societo jam havis 200 membrojn, grupojn en Budapeŝto, Kassa kaj Arad, kaj 10 kursojn por 500 laboristoj. Kaj tiam aperis jam la populara lernolibro de *Polgár*, kiun HESL eldonis ankoraŭ sesfoje.

1913 estis turnopunkto en la historio de la Hungaria E-movado. La laborista E-istaro tiujare komencis organiziĝi grandskale. Kaj ĝia organizaĵo, la HESL, transvivis ne nur la unuan mondmiliton, sed ankaŭ la kontraŭrevolucian blankan teroron en 1919—1922. Poste, superante la burĝan alon de la landa E-movado, ĝi farigis forta taĉmento de la kontraŭfaŝisma agado, servante kaj sur klasbatala kaj sur lingvokultura kampoj la interesojn de la socia evoluo. Estimplene ni memoras ĝiajn iniciatintojn.

Árpád *RÁTKAI*

Moseo, alia dramo de Madách

La jaro 1973 estas jubilea ankaŭ por la aŭtoro de La Tragedio de l'Homo, kiun la E-istoj konas el la tradukmajstraĵo de Kalocsay. Ankaŭ Madách naskiĝis en 1823 kiel Petőfi.

Post la Tragedio, nelonge antaŭ sia morto en 1862, li verkis la dramon „Moseo". En tiu Biblio-tema dramo li volis simboligi la sorton de la hungara popolo kaj en Moseo formi la figuron de la revolucia gvidanto KOSSUTH.

La kritikistoj rigardis Madách kiel, „unuverkan" verkiston; fakte liaj pluraj teatraĵoj verkitaj ne atingis scenejon. Sed „Moseo" estas valoraĵo. Sándor *Hevesi*, iama farma direktoro de la Nacia Teatro skribis, ke „en la tuta hungara dramliteraturo ĝi estas la plej potenca sceneja alegorio. Post la falo de la libermilito oni ne povis paroli en Hungarlando pri libero kaj konstitucio. Madách verkis la dramon de la hungara libero kaj konstitucio, priverkis la Habsburgan tiranecon kaj la batalantan hungaran profeton, la majestan lukton de malgranda popolo ... per tia sceneja forto, kiu ankaŭ nun ne povas resti senefika." Fama kritikisto, Aurél Kárpáti, skribis, ke en MOSEO la alvokita gvidanto staras en konflikto kun la savota popolo kaj montriĝas la historio-krea rolo de la persono kaj popolo.

Oni jam dufoje eksperimentis pri la prezentado de la dramo ankaŭ en la Nacia Teatro de Budapeŝto (1925), sed sensukcese. La lastaj jaroj fine alportis ĝian sukceson. Renoma literatoro, Dezső Keresztury, helpis revivigi por la nuna publiko la dramon, ĝin retuŝante, elsarkante la arkaismojn, adaptante la plurloke pezastilan teksto n al la postuloj de la sceneja parolo. (Tion saman siatempe faris ankaŭ Arany pri la Tragedio). La dramon unue prezentis la bona provinca teatro de la urbo Veszprém, kaj poste kun granda sukceso la Nacia Teatro en la ĉefurbo; ĉi tiun prezentadon dissendis ankaŭ la televido.

Mi citas el kritiko; „Kia forto pulsas en la diskutoj, kiujn Moseo faras kun si mem, kun Dio kaj kun la popolo, kaj per kiuj li ne fleksas la popolon, sed sin mem, tiel konformiĝante al la sorto, ke li fleksi devigas la sorton." La potenc-avida, senindulga popolgvidanto, akceptinte la saman sorton. kiun havas lia popolo, fariĝas saĝulo, ĉerpanta siajn eblaĵojn el la popolo. Iam li havis eblon akiri la tronon de faraono, sed poste, genufleksante antaŭ sia alvokiĝo, li lernas vivi kaj morti en sia popolo, kaj fine metas sur sian vivoverkon la kronon, transdonante tiun al sia sekvanto.

P. Balkányi

STRATOJ KAJ ESPERANTISTOJ

La Internacia Lingvo jam delonge akiris tutmonde, ke nomoj de stratoj aŭ placoj memorigu la loĝantojn kaj vizitantojn al la ideo de la senpera internacia interkomunikado. Kvankam tio ne estas „fina" venko, tamen ne malgravas, ke multaj urboj kaj vilaĝoj havas Esperanto-stratojn, Zamenhof-placojn, se ne paroli pri la multloke troveblaj memorŝtonoj kaj bustoj.

La centjara Budapest — respektive la hungaraj esperantistoj — rajte povas fieri pri tio ke tuta vico da stratoj memorigas pri la heroaj tempoj de la Hungarlanda Esperanto-movado. Kaj ne nur la Esperanto-parko kaj memorŝtono, inaŭguritaj okaze de la 51-a Universala Kongreso en 1966, sed pli malpli famaj movadanoj „havas" siajn stratojn en la hungara ĉefurbo, havanta jam 22 grandajn distriktojn. Ni raportis jam pri inaŭguro de memortabulo de Julio Baghy sur lia iama loĝdomo en la Rottenbiller strato. Karaj estas al ni ankaŭ la avenuo Karinthy Frigyes, nomita pri la granda verkisto, humuristo, iama prezidanto longdaŭre de Hung. Esp. Societo, kaj fervora batalanto por nia ideo publike kaj eĉ en liaj verkoj (pluraj estas legeblaj en nia lingvo). Multaj aliaj en la kadroj de la laboristo-organizaĵoj uzis-utiligis nian lingvon, estante samtempe pioniroj de la modernaj ideoj. La bulvardo Hámán Kató-körút portas la nomon de komunista martirino, gvidinto de la Hung. Esp. Laborista Societo. Kiel bona internaciisto, ŝi mem instruis la lingvon, uzis ĝin ankaŭ por la bono de la subpremita komunista partio. Sia helpanto estis inter aliaj Kulich Gyula, kies nomon portas placo en proleta kvartalo, ripozejo de maljunaj laboristoj kaj ludantaj infanoj; kiom trafa estis la nomdono! Ja por ilia trankvila maljuneco kaj gaja infanaĝo li donis sian vivon ankoraŭ juna, tamen tiam jam delonge lerta kaj fervora esperantisto. Skribante pri ambaŭ, ni aldonu, ke pro la vasteco de Budapest, (iamaj) antaŭurboj ankaŭ havas eĉ plurajn stratojn nomitajn pri Hámán kaj Kulich.

Estas avenuo en grava moderna kvartalo nomita de iama esperantisto, Szakasits Árpád út, kiu poste iĝis prezidanto de la nova hungara respubliko, elstara gvidinto de laborista partio. Kilián György, antaŭmilite juna kaj gaja, tamen jam sperta esperantisto-aktivulo, martiro de la kontraŭfaŝisma movado por du stratoj donis sian nomon. Batalanto por nia ideo estis la grava poeto Juhász Gyula (strato en la 18. distr.), kaj frua pioniro de artefarita internacia komunikadsistemo Bolyai Farkas, grava matematikisto (IV. distr.).

Zamenhof mem havas nomon de strato en antaŭurbo (17. distr.), ankoraŭ ne la indan je lia genio kaj faro. Same troviĝas krom la menciita parko ankaŭ Esperanto-strato en la 17. distr. Dum la milito helpis sindone al la persekutatoj kontraŭ la naziistoj sveda esperantisto, Valdemar Langlet, tiam lektoro ĉe la universitato de Budapest, kaj nun en la grava proleta kvartalo Újpest salutas la pasanton lia heroa nomo.

E. F.

KIPSZER KIPSZER KIPSZER

Könnyűipari Szerelő és Építő Vállalat



MUNTAD-KAJ
KONSTRUAD-
ENTREPRENO
POR LA MALPE-
ZA INDUSTRIO

Budapest X.,
Jászberényi út 34—36

Adreso:
1475 Bp. Poŝtkesto 28.
Telefono: 148-010
Telex 22-53-28



KIPSZER KIPSZER KIPSZER

KIPSZER **Projektas, konstruas, produktas, muntas**

KIPSZER **Entrepreno por kompleta projektado kaj realigado**

KIPSZER **Je unu mendo ĝi entreprenas kaj la projektadon kaj la efektivigadon**

KIPSZER **De la projektado ĝis transdono de ŝlosiloj**

KIPSZER **Ĉio en unu loko signifas: rapide, komforte kaj oportune**





Árpád Abonyi-Nagy

Iam mi havis ĉevalon

Ho, mi neniam estis tiel riĉa, ke mi havu propran ĉevalon je mia propra plezuro. La ĉevalo, pri kiu temas, estis donaco de la iama armeo. Ni servis en ĝi kune — la ĉevalo kaj mi.

La ĉevalo estis lerta, eĉ — pardonu la esprimon — inteligenta. Nepre pli inteligenta ol kelkaj ĉefserĝentoj.

Komence ĝin certe ĉagrenis mia senrutineco kaj supozeble ĝi ankaŭ plendis pri mi al siaj samsortanoj. Sed poste — ni kunlaboris bonege! Se mi ne- aŭ miskomprenis komandon blekitan de nia ĉefserĝento, ĝi komprenis ĝin ĉiam kaj observis ĝin laŭregule, eĉ malgraŭ mi. Nu, tiu bleko pli similis ja al ĝia lingvo ol al la homa. Kaj kompreneble ankaŭ mi klopodis ĝin rekompenci per sukerkubetoj, per kiuj mia poŝo ĉiam estis plena. Certe ankaŭ tio kontribuis, ke ni sukcesis trafari la rekrutedukadon, diversajn ekzercojn, eĉ la grandan, la someran. Post tio ankaŭ mi mem fariĝis serĝento. Mia ĉevalo certe diris al siaj kolegoj: „Nu, kion mi diris? Mi sukcesis fari husaron el la bubo."

Sed mian — aŭ nian — feliĉon detruis katastrofo. Ĝi enkorpiĝis en juna leŭtenanto, kiun, post lia plenumo de la militakademio, oni lokis en nia skadro. Al li, nome, ekplaĉis mia ĉevalo kaj li ordonis:

— Serĝento. Mi foriros por du semajnoj. Post mia reveno ni interŝanĝos niajn ĉevalojn. Dume rajdu ankaŭ mian beston, por alkutimiĝi.

— Jes, sinjoro leŭtenanto! — kion alian mi povis diri?

Sed, Dio de la husaroj! Kia ĉevalo estis tiu de la leŭtenanto! Obstina, malica, eĉ insida. Kaj granda!

Malgaje mi iris en la stalon kaj mia ĉevalo tuj eksentis tion: metis sian kapon sur mian ŝultron kvazaŭ konsole. Mi staris tre proksime al ploro. Sed tiam en la stalon venis Johano. Li estis kaporalo kaj stalestro, mia iama samlernejano kaj bona amiko malgraŭ la „rangdiferenco". Tuj li konstatis, ke mia humoro kriplas. Je lia demando, mi rakontis al li la „katastrofon", kaj diris, ke mi turnos min al la regimentestro.

— Tiel malbone vi ilin konas? Ĉi tie pravas, kies rango estas pli alta — li diris. Sed post iom da pensado li sereniĝis. — Estu trankvila, la ĉevalo restos via.

Mi ne komprenis, kiel.

— Aŭdu! Mi rimarkis, ke la leŭtenanto sidiĝas sur la ĉevalon ĉiam de dekstre.

Mi komprenis nenion. Johano ridis kaj nenion klarigis. Sed poste mi sciiĝis, ke laŭ lia preskribo ĉiutage plurfoje husaro nekonata al la ĉevalo sidiĝas sur tiun ĉi de dekstre kaj samtempe donas al ĝi fortajn batojn. La metodon mi miris, sed la batoj al mi ne plaĉis. Vane. Johano diris, ke ne ekzistas alia metodo. Dum du semajnoj, laŭ la konsilo de Johano, mi kaj mia ĉevalo ne vidis unu la alian.

Dume mi rajdis la sovaĝbeston de la leŭtenanto kaj tio ne estis plezuro. Jam resti en la selo bezonis mian tutan forton kaj ofte la husaroj jam antaŭridis, ke la besto instruos min fali sen paraŝuto. Sed mi sukcesis gardi mian renomon.

Tamen, foje, kiam mi rajdis ĉe la fino de la skadro en agrabla aŭtuna mateno, subite automobilo nin preterkuris. Kaj mia ĉevalo freneziĝis: baŭmis, saltis, kalcitris. Malespere mi klopodis min ekvilibrigi en la selo kaj dume mi rimarkis, ke belega blonda virino en la aŭto ridas pri miaj penadoj. Tiu rido estis la guto, de kiu la pokalo transverŝigis.

— Ni vidu, bestaĉo, kiu el ni estros la alian! — mi kriis kaj tuj per miaj genuoj mi direktis la bestion al freŝe plugita agro kušanta apud la ŝoseo. Kaj mi delasis la bridon. Je tio, la ĉevalo ekgalopis freneze; ĝia kolhararo naĝis en la aero. Kaj mi eĉ batadis ĝin per mia kanbastono. Sed atinginte la molan agrogrundon, la besto vane klopodis galopi: la piedojn katenis la algluiĝanta koto. Kiam post unuhora torturado mi redirektis ĝin al la ŝoseo, ĝi estis blanka de ŝaŭmo. Kaj la tuta regimento miris ĝian metamorfozon: la misfama diablo fariĝis milda ŝafido. La kolonelo sentis konfirmita sian tezon: Malbona ĉevalo ne ekzistas, nur malbona rajdanto. Kaj mi fariĝis la heroo de la tago. (Ĉu simile naskiĝas ankaŭ la „veraj" herooj?)

Dume Johano sciigadis min, ke lia „metodo" bone evoluas.

Venis la tago, kiam la leŭtenanto estis transprenonta mian ĉevalon. La skadro, post la matena raporto, estis enseliĝonta. La kolonelo komandis:

— Sur ĉevalon!

Dum centono de momento ĉiu husaro sidis sur sia ĉevalo, krom... krom nur mia leŭtenanto, kiu — de dekstre — ne povis eĉ proksimiĝi al mia ĉevalo, kiu baŭmis, hufbatadis, kalcitris kiel furioza diablo. Tiam la leŭtenanto ekbatis ĝin. Nu, neniam iu vidis ion similan! La kolonelo kriis nervoze:

— Sinjoro leŭtenanto, ĉu vi scias rajdi? — Poste li ĉirkaŭrigardis, ekvidis min kaj ordonis: — Serĝento, montru vian lerton!

— Je via ordono! — mi diris, saltis de la ĉevalo, al kiu mi dankis mian reputacion, kaj aliris mian ĉevalon, tremantan de timo. Sed ĝi rekonis min: en la grandaj fidelaj okuloj aperis fido kaj ĝojo. Mi karesis ĝian kolon, iom manipulis ĉe la selo kaj poste trankvile sursidiĝis.

— Sinjoro leŭtenanto! Ĉu vi vidis tion? — demandis akre la kolonelo. — Serĝento, reiru al via ĉevalo! Sinjoro leŭtenanto! Enseliĝi! — li ordonis.

La spektaklo okazis precize kiel antaŭe. La kolonelo ŝajnis tedata de la afero:

— Serĝento! Transprenu la ĉevalon de sinjoro leŭtenanto kaj donu al li la vian!

— Je via ordono!

La ŝanĝo estis farita. La kolonelo rigardis jen min, jen la leŭtenanton. Eĉ nun mi ne povas kredi, ke li ne konjektis „ion".

— Serĝento! — li ordonis plu, — havu tiun sovaĝbeston kaj dresu ĝin. La alia, kiun vi malsovaĝigis, apartenu al sinjoro leŭtenanto.

Poste li komandis ekrajdon. Kiam ĉe la fino de mia skadro mi preterrajdis Johanon, ni komplice kaj ridetante interokulis.

Elek Benedek

La kaprozugoj de Balatono

Kiuj sin banas sub Tihany, en la lago Balatono, tiuj trovas multegajn ŝtonetojn, kiuj mirinde similas al kaproungoj.

Mi rakontos la febelon, kiamaniere tiuj venis ĉi tien.

Antaŭlonge, ege antaŭlonge sur la bordo de Balatono loĝis maljuna demona virino, kiu havis belegan kaprogregon. Ĉiu, kiu vidis ĝin, admiris la belajn silkharajn kaprojn. Nu, sed fieris ja la virino:

— Ne troviĝas kaproj similaj al la miaj en la tuta mondo.

La tempo pasis. Foje, mi ne scias de kie, belega juna knabino alvenis sur la bordon de Balatono. Kaj ŝi venis ne sola! Ŝi peladis kaprojn antaŭ si. Kaj kiajn kaprojn?!

Gala envio plenigis la muljunan virinon, kiam ŝi ekvidis la kaprojn de la knabino. Nu, ne tre miru pri tio, ŝi opiniis ja, ke ŝia kaprogrego estas la plej bela en la tuta mondo, kaj jen, tiu de la fremda knabino estis pli bela, eĉ miloble pli bela! Ĉar sciu, ke la ungoj de la kaproj de la knabino estis el pura oro, kaj eĉ pli iliaj haroj! Ili brilis, brilegis, kiel la brila suno.

Ekde tiu momento, kiam la virino ekvidis la orharajn kaprojn, ŝi perdis sian trankvilon. Tage-nokte ŝi pensis, pensadis en si, kiamaniere ŝi povus forigi la knabinon. Poste ŝi havos ja ankaŭ la orharan kaprogregon.

La knabino eĉ ne konjektis, pri kio cerbumadas la demona virino. Ŝi sidadis dum la tuta tago sur la bordo de Balaton-lago, plezurigis sin per la akvo de la lago, kaj okazis tiujefoje, ke ankaŭ la vespero trovis sin sidanta sur la bordo: ŝi rigardis en la spegulo de la akvo la brilantajn stelojn. Kaj dume la kaproj vagadis libere dise; la bona Dio, kiu gardas ĉiun kreitan beston, gardis ilin.

Do, la maljuna virino nur cerbumadis en si, kaj iu-vespere, dum la knabino sidadis sur la bordo, ŝi jungis antaŭ la plugilon siajn ses belegajn bovojn, kaj ŝi plugis larĝan, profundan sulkon laŭ la Balaton-lago, tiel larĝan kaj tiel profundan, ke la knabino ne povu iri al sia grego. La maljuna virino certe estis en kontakto kun la diablo kaj tiu kapablis helpi ŝin por plugi la sulkon, ĉar tera homo ne povus fari tion. Sed ĉi tio ankoraŭ ne sufiĉis! Tuj, kiam estiĝis la sulko, komenciĝis terura tempesto, muĝis, hurlis la lago, altenŝprucis la akvo kaj dum momento plenigis la tutan sulkon. La kompatinda knabino konfuzege kuradis tien-reen, sed kie ajn ŝi kuris, la akvo baris la vojon, kaj subite komencis ŝin kuntreni la ondoj, kaj ŝin puŝis en la sulkon.

Miaj kaproj, miaj karaj belaj kaproj! — kriis la knabino kaj dronis. Ŝin plu ne vidis homa okulo.

Ho, kiel ĝojis la demona virino. Ŝi kuris al la orharaj kaproj por peli ilin en sian stalon, sed kiam la kaproj ekaŭdis la kriadon de la knabino, kvazaŭ ili estus perdintaj sian vidpovon, tiel ili kuris al la sulko. Sed ja postkuris ilin la demona virino por ke iel ŝi povu ilin antaŭi.

Kaj kio okazis? Okazis, ke ankaŭ la kaproj de la demona virino, kiam ili vidis kuri ilian mastrinon, ekkuregis post ŝi, rekte al la sulko. Kiam la demona virino alvenis tien, la orharaj kaproj jam malaperis senpostsigne: ili ensaltadis en la sulkon, mortis kun sia kara paŝtistino.

— Reen, reen! — kriadis la demona virino al siaj kaprinoj.

Ŝi ne povis krii plu, ĉar altenŝprucis terura granda ondo kaj ĝi kuntrenis la kaprojn kaj la maljunan virinon en la profundon.

Antaŭlonge okazis ĉi tio, ege antaŭlonge... El la kaproj de la demona virino kaj el la kaproj de la bela knabino restis sole iliaj ungoj... Ankaŭ tiuj ŝtoniĝis. Kiel do ili ne estus ŝtonigintaj, ĉio ĉi okazis ja antaŭlonge, ege antaŭlonge, kion mi nun rakontis.

Tr.: Krisztina *NYITRAY*

HUMURO

Skoto staras antaŭ tribunalo.

— Vi estas akuzata — diras la juĝisto —, ke kie ajn vi restadas, vi anoncas vin sub fremda nomo. Kial vi faras tion?

— Ĉar mi trovis skatoleton da nomkartoj.

*

La juĝisto demandas la kas-boriston.

— Klarigu al mi, kiel vi sciis trarompi ŝtalo§rankon tiel fortan kaj komplik-seruran?

— Estus vane, sinjoro juĝisto. Pririgardante la sinjoron juĝiston, mi vidas, ke vi tion ja ne komprenus.

*

—Kial vi ploregas? — demandas patrino sian filon.

— Ve, ve, ve, paĉjo volis enbati najlon kaj surbatis sian fingron per la martelo.

— Kaj ĉu pro tio vi ploras tiel amare?

— Komence mi ridegis.

*

— Kial la edzoj ĉiam forgesas pri la datreveno de sia edziĝo?

— Ĉu la fiŝhokisto memoras, ke li kaptis esceptmaniere grandan fiŝon?

— Nu jes, kompreneble.

— Kaj ĉu la fiŝo memoras tion?

*

Cineas, la filozofo, demandis sian reĝon Pyrrhus, kion li faros post la konkero de Italio.

— Mi konkeros Sicilion.

— Kaj poste?

— Afrikon.

— Kaj poste?

— La tutan mondon.

— Kaj poste?

— Mi ekripozos kaj estos feliĉa.

— Ĉu ne estus pli simple — diris Cineas —, se vi nun tuj ekripozus?

*

Aĝa virino sidas en taksio kaj diras al la ŝoforo:

— Malrapide veturu, ne devancu, voju en flankstratoj, kie la trafiko estas malgranda, singarde bremsu!

— Jes ja. Kaj se tamen okazus io, ĉu vi deziras enterigon aŭ kremacion?

*

La grafo sonoriletas al sia lakeo:

— Jean, iradu tien reen kelktempe. Mi devas decidi en grava afero.

*

Sur murtabulo de la Cambridge-a universitato estas skribite: „Intelektulo estas tiu, kiu uzas pli multajn vortojn, ol kiom necesas por tio, ke li diru pli multe, ol kiom li scias."

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

HEROLDO DE ESPERANTO publikigas el „Jes, sed", organo de la Studenta E-Klubo Zagreba, nekrologon pri la mortinta IOE (Instituto por Oficialigo de Esperanto). La aŭtoro analizas la kaŭzojn de la morto kaj konstatas, ke IOE faris du erarojn: unue, ĝi restis grandparte sub la idea signo de la malnova, kritikata movado; due, plurfoje ĝi faris ekstreman oponon al la tradicia movado, kondukantan al malamikeco. La aŭtoro volus dividi la movadon en du partojn: en la amatoran, t.e. esperantistan, similan al la ĝisnuna praktiko, kaj en profesian, poresperantan. La tasko de ĉi lasta ne estu varbi entreprenojn por uzo de Esperanto, sed krei entreprenojn, kiuj uzas kaj devigas uzi E-on. Por modelo li mencias la Zagrebajn pupfestivalojn, kluj estis anticipe tiel aranĝitaj, ke la partoprenantoj devas uzi E-on. Nu, certe ĉi tio estas certa vojo por la triumfigo de E-o — mi dirus, se ekzistus jam almenaŭ kvin tiaj entreprenoj. Ĉiuokaze estas domaĝe, ke PIF ne konigis detale la metodojn, per kiuj ĝi povis akiri tian sukceson.

En SVISA ESPERO, malgranda, sed neta gazeto, estas interesa la artikolo de *H. Vatré* pri la restarigo de ekzamena komisiono en Svislando, ĉar ĝi komparas la aspektojn de la ekzamenoj en kvin diversaj landoj (franca, germana, hungara, nederlanda, svislanda) kaj ĉe la internacia ekzameno de UEA. Poste li metas ses demandojn, kiuj liveras riĉan eblon por diskutado.

NORDA PRISMO, eĉ se malrapide, tamen brave progresas por ĝisatingi sin mem, t.e. por aperi precizdate. Menciindaj estas en la lasta numero la interparolo de *R. Haupenthal* kun *Kalocsay*, kaj la artikolo de *Marjorie Boulton* pri la arto insulti en E-o, speciale ĝuebla pro sia drasta ideoriĉo kaj spritinundo. Nemirinde, ke *Van Themaat* dediĉis al ŝi sian rakonteton „La Embrio". Poste tamen mi trovis tiun dediĉon ne adekvata, ĉar la Boulton-aj ideoj ne estas abortaĵoj. — La novelo de *Szathmári* estas interese verkita kun la kutima arta kaj akra antitezo de okazaĵoj konfrontitaj, sed ĝia idea vipo-frapo eble malpli klakas ol kutime. — Ĝoje mi salutis la fabelon de *„Oĉjo Remus"*, kies fabeladon mi plurfoje televidis kun plezuro. — Plurajn poemojn tradukitajn kaj originalajn enhavas la kajero, sed ili estas tiel lerte dislokitaj, ke vulgarulojn ili ne ĝenos, dum versamantoj povas el ili preni plurajn korintajn berojn. — Plaĉis la recenzo de mistera NTRS pri la „Cigana Romancaro" de *Garcia Lorca*. Kaj mi enviis, ke li disponis pri amplekso de okcent tridek vortoj.

En SENNACIULO frapis miajn okulojn la nomo *Kruit*. Li estas, kiu fanfaronis en iu sia recenzo pri tio, ke li ne legis la recenzitan libron kaj ankaŭ aliajn li avertis pri ĝia lego. Ĉi tiu senekzempla recenzisto nun riproĉas, ke en PIV nur la litero „K" (Kalocsay) estas uzata ĉe vortoj en ekzemplaj frazoj, dum aliaj aŭtorsignoj mankas, kvankam K. laboris nur poezie. Ŝajne Kruit tenis sin al sia kutimo ne legi la recenzatan libron, ĉar alie li rimarkus tie nomsignojn de Grabowski, Kabe kaj de l' du Testamentoj. Cetere, kial miri, se poeziajn vortojn nomsignas poeziisto. — En la numero 1/1973 min ĝojigis la escepte inteligenta gvidartikolo de *P. Levi*. — *Skeldido*, kompreneble, defendas la reformismon kontraŭ la "brutala renverso de la socia sistemo".

En THE BRITISH ESPERANTIST plu aperas la anglaj tradukoj de E-aj poemoj fare de *W. Auld:* en la tri lastaj numeroj mi trovas tiajn de *M. Boulton, N. Kurzens* kaj *V. Sadler;* espereble mi povos ankoraŭ resume ilin apreci. — En la marta numero mi trovis perlon specialan; artikolon de *Marjorie Boulton* pri la „elementaj principoj de recenzado". Mi ne povas ne citi jenon: „Mi emas suspekti, ke multaj nuntempaj intelektuloj kaj aliaj timas ŝajni naivaj pli ol ŝajni malicaj, malĝentilaj, egoistaj aŭ malhonestaj; mi eĉ suspektas iom, ke troa timo pri naivoŝajno estas la ĉefa morala kaj intelekta malsano de multaj intelektuloj". Poste ŝi parolas pri recenzoj, kies sola kritika „juĝo" estas citaĵo el la antaŭparolo, aŭ kies sola lingva kriterio estas mencio, kutime malaproba, de kelkaj „neologismoj" (ofte tiel neo-aj, ke kleraj esperantistoj jam uzadis ilin dum tridek jaroj, aŭ eĉ Zamenhof uzis ilin). Poste ŝi parolas pri la spacomanko: „Ligite per limo de cent kvindek aŭ eĉ cent vortoj oni nepre ne povas recenzi, nur aprobe aŭ malaprobe mencii". Mi aldonas, ke sen literatura kritiko ne povas vivi literaturo kaj sen sufiĉe da spaco ne povas edukiĝi literaturaj kritikistoj. Poste *M. Boulton* en ses punktoj kaj en tri subpunktoj de la sesa punkto priskribas la postulatojn observendajn de recenzistoj. Ĉi tiujn punktojn ĉiu recenzisto devus kopii por si kaj relegadi kiel brevieron. Mian mesaĝon al la „aliflanka" *D. J. F. Quirke* detranĉis la tondilo de la paĝigisto, sed ĝi ne perdiĝos.

GUSTAVO ADOLFO BÉCQUER
KUN SOPIRA KORO

Poemaro. Tradukis *Fernando de Diego.* 93. p. Eld.: Eldona Fako de Hispana Esperanto-Federacio, Zaragoza, 1972. Prezo: 2 Us. dolaroj.

La nomo de *Fernando de Diego* feliĉe jam sonas familiare por ĉiu klera esperantisto: per la esperantigo de la *Cigana romancaro* de Federico Garcia Lorca li tuj okupis por si lokon inter la plej eminentaj tradukistoj de nia lingvo. Nun li alfrontis alian grandan poeton (kvankam ne kompareblan al (Garcia Lorca) por prezenti lin al la internacilingva publiko.

Ĉar verŝajne la plimulto de la esperantista legantaro estas nesufiĉe orientita pri la hispana poezio, la erudicie verkita enkonduka eseeto de *José Ignacio Ciordia* estas vere bonvena.

Bécquer naskiĝis en 1836, kaj mortis apenaŭ 34-jara, en 1870. Krom la mallonga vivo kaj malfavora sorto li forte memorigas pri Heine kaj Petőfi (ĝoje mi legis mencion pri tio ankaŭ en la antaŭparolo), ankaŭ per sia strebado al simpla, facile komprenebla esprimformo, emfazita muzikemo, ktp. Nur en unu punkto ŝajne li iom postrestas de la menciitaj du poetofratoj, kaj tio estas la forta socia sentemo. Kompreneble tio absolute ne malgrandigas liajn meritojn, ja li faris veran poezian revolucion: en la epoko de la longaj, bombastaj, retorikaj poeziaĵoj li ekverkis kun popolkanta simpleco.

La traduklaboro de Fernando de Diego estas vere senriproĉa, kelkfoje eĉ genia. Staru ĉi tie por pruvo la unua strofo de la belega *Tu pupila es azul:*

Pupilo via bluas ... Se vi ridas,
ĉe ĝia milda helo mi memoras
la treman lumon de mateno
kiun la maro sorbas.

Oni abunde povus citi same belajn, aŭ eĉ multe pli belajn strofojn, tamen, foje-foje miaj oreloj ekprotestetis. *Fernando de Diego,* konforme al la hispana poetika tradicio, multnombre aplikas en siaj tradukoj asonancojn. En la *Cigana romancaro* ili ne ĝenis, ĉar ili absolute perfekte konvenis por la pezaj, martele forĝitaj versoj de *Garcia Lorca:* puraj rimoj tie estus neadekvataj. Sed la esenco de la Bécquer-versoj — almenaŭ por mi — estas la milde ondanta vortmuziko, kaj trouzo de la asonancoj malpliigas ilian muzikecon por nehispana orelo.

La verko, malgraŭ tiu ĉi kritiketo, meritas ĉies atenton: espereble la esperantistaro inde subtenos tiun ĉi indan librojaran iniciaton de la hispanaj esperantistoj.

V. BENCZIK

Aperos „Eszperantó Magazin"

Fine de septembro aperos la unua numero de nova organo de Hungara Esperanto Asocio, titolita „Eszperantó Magazin" ('Esperanta Magazino). Nia organo en sia eksterajo estos tia sama kiel Hungara Vivo, sed ĝia celo estas disvastigi la ideon de la internacia lingvo inter la neesperantistoj, do „Eszperantó Magazin" aperos ĉefe hungarlingve, dumonate. Sur kvar paĝoj ni publikos esperanto-lingvokurson, kaj artikoletojn pri diversaj temoj kaj novaĵojn pri nia movado, enhavtabelon kaj malgrandajn resumojn kompreneble esperantlingve. Inter la aŭtoroj de EM estas troveblaj la plej famaj hungaraj scienculoj, verkistoj, artistoj, do ni povas rekomendi nian novan revuon ĉefe al ĉiuj hungaroj, loĝantaj en Hungario kaj en eksterlandoj, sed ankaŭ al ĉiuj esperantistoj, propagandistoj, agemaj samideanoj, kiuj serĉas la diversajn rimedojn por disvastigo de esperanto. La „Eszperantó Magazin" estas abonebla ĉe la Hungara Poŝto: Centra Gazetoficejo, Budapest, V. József Nádor tér 1. La abono (ses numeroj) estas por jaro 24 forintoj, krome 9.60 Ft por afranko. Abonprezo por unu jaro en Usonaj dolaroj = 3.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Vilmos Benczik

Ĉifoje ni ĉerpos la demandojn el la drama poemo de Imre Madách: *La Tragedio de l' Homo,* tradukita de K. Kalocsay. (Oni uzu la *duan* eldonon, aperintan en 1965.) Kiel kutime, ankaŭ nun estas necese alsendi ĝustan respondon al *du* demandoj minimume.

1. En la *Unua Bildo* La Sinjoro direktas la sekvajn vortojn al Lucifero. Bonvolu alsendi *la unuan verson de la respondo de Lucifero.*
   Ador' pri mi deviĝas, ne kritiko.

2. En la *Sesa Bildo* romia virino kantas la sekvajn versojn *Kio estas ŝia nomo?*

   Estis la mondo de malsprito:
   Lucretian en ŝia lito
   vizitis bela kavaliro,
   kaj ŝi ne ardis de sopiro,
   nek kuris al bordel' brustnude,
   per frida fer' sin pikis prude.

3. Ni citas ĉi tie la duan, trian, kvaran kaj kvinan versojn de certa Bildo. *Bonvolu alsendi la lastan verson de la sama Bildo.*

   Jam malaperis ĉi nocioj oldaj.
   Patruj' — ĉu ne ideo bagatela?
   La antaŭjuĝo naskis iam ĝin,
   striktanimeco, konkurenc'
   defendis.

Por informo: la demandojn de tiu ĉi enigmo por la venonta numero de HV ni ĉerpos el la novelaro de Sándor Szathmári: *Maŝinmondo,* aperinta ĉe Stafeto.

El inter la solvintoj de la enigmo en la numero 1/1973 gajnis libropremion *Christine Brauer* (GDR) kaj *József Cseh* (Hungario). La libroj estis senditaj perpoŝte. Ĝustan solvon alsendis ankoraŭ: *Ĉeĥoslovakio:* Miroslav Hromas, Bárta František, Jiři Patera; *GDR:* Werner Gafke, Klaus Klimmt, Werner Polster; *Pollando:* Jerzy Banacki; *Sovetio:* Kalju Lillepuu, Johannes Palu; *Hungario:* István Visy, István Nagy, Károly Juhász, Éva Fodor, Zsigmondné Kovács, Imre Balogh, Sándor Varga, Mária Leczkési, Anikó Kiss, József Rabi, Izabella Hidas, Márta Vári, Károly Magyari, Ernő Tomcsányi, Béla Lehoczky, Lászlóné Bognár, Ilona Osgyán.

FORUMO

HV perspektivas bone la malnovan kaj novan en via patrolando, ĝiajn vivantajn esperojn kaj forgesitajn glorojn. Sed en Hungarujo ne ekzistas pura fonto de mondoklaro, kiu vidu, ke la homoj ĉie soifas kaj malsatas mondkulturon, homaran celon ĉie sur la ter'. — Kial ne via gazeto surprenu rolon de M o n d k u l t u r o, kaj el fontoj ĉerpu ne nur en Hungarlando sed sur tuta tero. — Via sincere *Guy B. Tordoff,* 82 Pendennis Park, B r i s t o l, BS4 4JN, A n g l u j a.

Koncerne la artikolon kun titolo: Ĉu ni estas malfacilaj?

Antaŭ kelkaj jaroj vi ĉiam enpresis malgrandan liston de nekutimaj vortoj kaj klarigis ilin. Ĉu vi ne povus ree apliki tiun bonan metodon? — Mi pensas, ke vi faros bone plu iri la ĝisnunan vojon, ĉar estus malutilo, degliti al lingva primitivismo. Kun koraj salutoj *Adolf Stanura,* Čkalov str. 863/25, 70 800 O s t r a v a, ČSSR.

Pri la kompreneblo mi povus diri, ke mi legas kaj tradukas laŭ viaj konsiloj. — Kune kun alia samideano mi legas la revuon, kaj ni klopodas unu la alian instrui. — Varmkore salutas vin la 67-jara *Ludoviko Péterfia,* IX. Ifjúmunkás u. 17. B u d a p e s t, Hungario.

LETERKESTO

Mi korege dankas pro la ekzisto de via bonega revuo. Ĉiam estas multe da gaj-serena etoso kaj festo, kiam mi reveninte de mia laboro, trovas alvenintan novan numeron de HV. Kaj tuj mi devas trafoliumi ĝin — kaj dume mia verdlingva koro iom strange kaj alie batas, ĉar trafoliumi vian revuon estas kvazaŭ fari promenadon tra freŝaera arbaro, fari naĝadon en friska akvo — mi sentas min kvazaŭ en alia elemento. — *Arne Bengtsson,* Abybergsgatan 32, 431 31 Mölndal Svedlendo.

„HV" — laŭ mia opinio — estas la revuo la plej interesa en Esperanto. Mi esperas, ke tia ĝi ĉiam restas, kaj mi instigos miajn gelernantojn al abono. — *Glauco Corrado.* Milano.

Studante E-on laŭ la luksa lernolibro de d-ro Szerdahelyi, niaj gelernantoj ekamis Hungarlandon, kaj nun ni festas kune kun niaj hungaraj geamikoj (el EVIG en Budapest) eĉ iliajn ŝtatfestojn. La 4-an de aprilo 1972 en nia lernejo fariĝis impona manifestiĝo pri nia amikeco kun Hungario. Nia rondeto aranĝis ekspozicion kun titolo „27 jaroj de libera Hungarlando". — *Arturs Kubulnieks,* E-rondeto „Fajrero", lernejo Ziemeri 228 732 Marinkalns, Latvia SSR.

Kiel iama abonanto al Literatura Mondo, ties kelktempa peranto en Anglio, kaj ties okaza kontribuanto, mi sentis profundan nostalgion, legante en via n-ro 4 de 1972-a jaro la artikolojn pri la jubileo de tiu bedaŭrata revuo. — Mi sciigas al vi, ke mi la 5-an de januaro 1973 paroladis antaŭ la Londona E-Klubo pri la jubileo kaj tutspeciale pri la historio de LM. — *Alec Venture,* 55 Park Hill, Carshalton Beeches, Surrey, Anglio.

Finfine ni korege salutas inter niaj korespondantoj gesamideanojn: *A. Logvin* el Moskva, *N. Hanson* el Halifax, *Saulcerite Neilande* el Riga, *Jozefo Rabi* el Gödöllő, *Erich Seidemann* el Dresden, *Miroslav Hromas* el Hradec Králové, *Ilija Andreev* el Ŝumen, *Linde Knőschke* el Berlin, *Marin Bacev* el Sofia. — La redaktoraro de HV tiamaniere dankas al siaj geamikoj la helpintencojn kaj la bondezirojn!

Al ĉiuj esperantistoj

Kiel oni povis sperti, en la lasta jaro ni komencis doni ian indan, interesan karakteron por ĉiuj numeroj de Hungara Vivo. La leteroj, opinioj de niaj legantoj atestas, ke ili akceptis ĉi tiun planon favore, ĉar oni ĉerpadis bone el la numeroj de HV — ekzemple — ĉe klubkunvenoj, prezentadoj, lingvoekzercadoj, ktp. Ĉi tiuj numeroj estas ankoraŭ mendeblaj, aĉeteblaj.

Ni povas rekomendi al ĉiuj esperantistoj:

3/1971 — numero pri Kálmán Kalocsay
4/1972 — numero pri Literatura Mondo
1/1973 — numero pri Sándor Petőfi
2/1973 — numero pri Gyula Illyés
3/1973 — numero pri Budapeŝto
4/1973 — numero pri Sándor Szathmári.
1/1974 — numero pri la originala E. prozo
3/1974 — numero pri la originala E. poezio

Redakcio de HV

KORESPONDI DEZIRAS

BULGARIO: Junulara klubo de Internacia Amikeco dez. kontaktiĝi kolektive k individue kun div. landoj por plifortigi la amikecon, organizi eksp.-ojn, aranĝi reciprokajn vizitojn. — Mladejki dom, Interklub, Šumen.

ĈEĤOSLOVAKIO: Adolf Stanura Čkalov str. 863/25, 70 800 Ostrava.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Helga Fehr, 49-j. kulturlaboristo kor. dez. ĉefe kun hungaroj: Singerstr. 66, 1017 Berlin.

HUNGARIO: Szabó Mária Rózsa fakdelegito de UEA pri lingvistiko, redaktorarano de HV, interŝanĝas ABOCO-librojn: Deák Ferenc u. 38/a, 1193 Budapest.

ITALIO: el Milano: s-ro Valentino Dionisi 30-j, Corso Garibaldi 95; s-ro Polerani Mauro 16-j, Via Suzzani 2; f-ino Manzoni Chiara 17-j, f-ino Manzoni Daniela 18-j, Via Imbriani 31; f-ino Cremona Paola 20-j, Via Mercantini 2 A; f-ino Balestra Isabella 15-j, f-ino Balestra Marina 14-j, Via Arbe 27; f-ino Anna Virginia Volonté 18-j. Via Moscova 47/a; prof-ino Vignali Pierangela 40-j, Via Mecenate 7; f-ino Rognoni Renata 24-j, Via della Sila 11; f-ino Moser Florence 22-j, Via Ressi 5; f-ino Gargioni Maria Cristina 19-j, Via Fouchet 33; el aliaj urboj: f-ino Sandra Benzi 13-j, Via Dante Alighieri 31, I—17014 Cairo Montenotte (Savona); s-ro Lucchesi Renato 25-j, Via San Rocco 36, Monza (Milano); f-ino Aquaro Sofia 16-j, Via Adda 6, I—20095 Cusano (Milano).

IZRAELIO: Josef Izraeli interŝanĝus kolorajn bildkartojn je motivoj: floro, urbo, artisto, folkloro; Eyn — Karmel, D. Na 30860.

KUBO: Rafael Puente 24-j fraŭlo dez. kor. ĉefe el Hungario: Calle 41 No. 8, ent. 2 y 4, Vedado, Habana.

Felipe Felipe 23-j, interes. pri pm, sondisk, muz, revuoj k angla lingvo: Calle 23 No. 1613 apt. 31 e/28 y 30, Vedado, Habana 4.

POLLANDO: Witold — Jan — Pavel Czerwinski 18-j, lernanto, vol. kor. kun hungaroj pri junularaj aferoj: Str. Tysiaclecia 83, 58—309 Walbrzych.

Teresa Zyczkowska 24-j. oficistino, interes. pri turismo, filmo, sporto, literaturo: 19—400 Olecho, ul. Zyndrama 4/29, woj. Bialystok.

Zofia Majewska 23-j. oficistino, inter. pri liter., teatro, vojaĝoj, kol. vidkartojn, gr-diskoj: Zdunska Vola, ul. Sieradzka 40 m 1.

Henryk Tikalowicz interes. pri pm, bk: 21—531 Dokudów II. p-ta Dubów pow. Biala Podlaska, woj. Lubelskie.

SOVETUNIO: Luksa memoraĵo pri ukraina urbo Zaporoĝio, la ridiga pupo-skatolo „Zaporoĝia kozako" — tre sukcesis dum la Montreala Mondekspozicio. Kiu volas ĝin ricevi, sendu 100 belajn okcidentlandajn aŭ koloniajn pm (uzitajn) al: D. Kolker prezidanto de ZKE, S-Kolcevaja 20—149, 330 058 Zaporojje.

Vajke Pajumaa 20-j. vendistino, kol. bk, pm, gr-d, revuojn, librojn: Viljandi mnt. 104 203500 Rapla, Estonio.

Anna Sergunina 38-j. sinjorino, 200007 Tallinn, Koidu 89—27, Estonio.

Kaljo Piiskop 40-j, pb, pm, boteloetiketoj, turismo: str. E. Vilde 53—96, Tallinn 200029, Estonio.

Abdullina Venera, 20-j. studentino de biologio, bk, insignojn, revuojn: Tjumenj — 3, do vostreb, 625003.

Vytautas Milašius 20-j. fraŭlo, diversteme, bk, insignojn, E-aĵojn: Zanavyku 9 — 4, Klaipeda — 12, Litovio.

SALUTON AL LA JUBILEANTO!



La centjara hungara ĉefurbo antaŭ tri jaroj solenis alian jubileon: la dudek-kvinan datrevenon de sia liberiĝo.

Okaze de tiu festo nia ĉefkunlaboranto, Lajos Tárkony verkis soneton sub titolo „Dudekkvin jaroj en Budapesto" — la poemo aperis en HV. 70/3.

Per la suba „kubo", ni prezentas novan formon de krucenigmo kiun oni devas solvi laŭ tri direktoj signitaj per A, B, C. La difinojn serĉu en tiu vicordo.

Ni citas la du finajn versojn de la poemo en la vicoj: B 1, C 22 kaj A 2. Ensendi sufiĉas nur ĉi tri vicojn, ĝis la 1-a de novembro en 1973.

Direkto „A":

2. LA LASTA VICO DE LA SONETO. 3. Ĉilia poeto, diplomato Pablo (1904—), en la jaro 1971 li ricevis Nobel-premion. 5. Apartenanta al la ĉefurbo de Britujo. 7. Konfederacia. 9. Malŝate ridindigi (Radiko). 11. Membroj de grupo, de societo. 13. Numeralo. 15. Maldolĉa por la gusto. 17. OPP. 19. Popola kostumo (du vortoj). 21. Neono kaj fluoro. 23. Parolfiguro, ŝajna alproprigo de vidmaniero de alia persono farita kun la intenco ĝin ridindigi (R). 25. Alĝeria havenurbo. 26. Koleopteroj. 28. Kaŭzo, motivo. 31. Persona nedifinita pronomo. 32. KU. 33. Manĝeblan globforman grajnon. 40. 551 per romiaj ciferoj. 53. Estos memfida. 55. Komformi sin al tio, kion alia persono ordonas aŭ malpermesas. 61. Parto de la skermo-matĉo kiu daŭras 6 minutojn, respektive ĝis la ricevo de 5 trafoj (R), (ASALTO, proponita vorto de T. Újlaki-Nagy en „La sporta lingvo en Esperanto"). 63. RS. 69. Kun adverba finajo, ronda disko turniĝanta ĉirkaŭ akso. 73. Persona nedifinita pronomo. 78. Sufikso esprimanta kolekton. 79. Numeralo.

Direkto „B":

1. LA UNUA PARTO DE LA ANTAŬLASTA VICO DE LA SONETO. 2. La „reĝon" de la bestoj. 4. Plurjaran ĝardene kulturatan herbon (Arnica). 6. PARTO DE LA HUNGARA ĈEFURBO SITUANTA DEKSTRE DE LA DANUBO. 8. Lirika poemo, dividita en strofoj, ordinare similaj inter si. 10. Senvosta saltanta vertebrulo el la klaso de amfibioj. 12. Radiumo. 14. Havi koran inklinon al iu. 16. La lasta libro en la Nova Testamento, kiu entenas misterajn revelaciojn pri la mondofino. 18. Ekstera vira vesto, kovranta la korpon de la ŝultroj ĝis proksime la koksoj (R). 20. Ligna aŭ metala peco, ordinare konusa, uzata kiel ŝtopilo aŭ kunfiksilo. 24. Havata opinio konforma al la vero. 26. Propora tempo dum kiu la suno estas sub la horizonto kaj ne prilumas (du vortoj). 27. Monto en Jerusalemo. 29. Granda komerca kunveno kiu okazas en fiksita periodo kaj loko por vendado de diversaj varoj. 30. Parto de la tersurfaco konsiderata el aparta vidpunkto (R). 33. Kovrajo de pako (R). 34. Adverbo. 45. Kiel la vico 8. 49. Loĝantoj de Eŭropa ŝtato situanta apud Adriatiko. 51. Apartenanta al ni. 57. Sur ĝi pendas la bildoj. 59. Nomo de la Jesu-patrino en la belartoj. 65. Supernatura estaĵo (R). 66. Estanta en tia kvanto, kia estas bezona (R). 70. Rilata al la osto de la piedo, situanta super la kalkaneo kaj formanta artikon kun la tibio. 75. Virseksa homido, rigardata rilate al la gepatroj (R). 81. Prepozicio. 82. Interjekcio. 83. Nedifina adjektivo.

Direkto „C":

22. LA DUA PARTO DE LA ANTAŬLASTA VERSO DE LA SONETO. 35. Specio de bovo, formortinta antaŭ kelkcent jaroj, de kiu devenas ĉiuj rasoj de domaj bovoj. 36. Pli granda ol orta, sed pli malgranda ol strečita angulo (R). 37. Metala kapŝirmilo por soldatoj. 38. Instrumento. 39. Ĉirkaŭa ekstrema parto de surfaco de objekto, rigardata laŭ ĝia longeco (R). 41. Samaj vokaloj. 42. OMU. 44. OT. 45. Valoraj metaloj. 46. Instrumentoj. 48. Spirita. 50. Hulo. 52. Oksigeno kaj fluoro. 54. Moviĝi per piedoj (R). 55. Sufikso montranta kolektivecon. 56. Literatura Mondo. 58. Nedifina pronomo, montranta iun objekton. 59. Masurio. 60. Refleksiva adjektivo. 62. Plurjaraj lignecaj plantoj. 64. LA TRIA GRAVA URBOPARTO DE LA HUNGARA ĈEFURBO. 66. Kapabla juĝi la aferojn tiaj, kiaj ili estas, kaj laŭ tio ĝusta konduti (R). 67. PARTO DE BUDAPEŜTO, SITUANTA MALDEKSTRE DE DANUBO. 68. Viro, dungita de privata persono, por helpi tiun en la korespondado, literatura verkado, serĉado de informoj kaj aliaj konfidencaj taskoj. 71. Apartenanta al certa ĉieldirekto. 72.Iridio kaj rodiumo. 74. Loĝanto en Azia ŝtato situanta en la valoj de Tigro kaj Eufrato. 76. Turni per speciala ilo la teron de kultivata terpeco (R). Virnomo, nomo de la nevo de Karlo la Granda (R). 80. Statuo de diaĵo honorata per privata aŭ publika kulto. 81. Precize klarigi per la ecoj aŭ nuancoj, kiuj apartigas ĝin disde la aliaj.

FERI

La ĝusta solvo de nia enigmo aperinta en HV 1973/1 estas

"POETOJ, DO TRA FAJRO-AKVO
EK POR POPOL' EK POR LA VER'!"

Libropremion gajnis: Christine Brauer, 69 Jena str. des 7. Oktober 76 el GDR; László Papp h., Gyömrő, Pf. 55 el HUNGARIO; Julio Szabó, Sighetul Marmatiei, str. Horia N. 10 el RUMANIO.

ABONO DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62,P. O. Box 149. — Abonprezo por unu jaro en Usonaj dolaroj = 2,—

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AUSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A — 1200, WIEN I. Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A — 1011, WIEN I.

AUSTRALIO: Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, ST. KILDA Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO: Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BRAZILO: Livraria Brody Ltd., Caixa Postal 63366, SAO PAULO. Livraria D. Landy Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO

BRITIO: Collet's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH.

The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

BULGARIO: Direkzia R. E. P. 11 Pl. Slawejkov SOFIA

ČEĤOSLOVAKIO: P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2. P. N. S. — dovoz tisku Leningradska 14, BRATISLAVA

ČINIO: Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

DANLANDO: Hunnia Books and Music Langemosevej 37, BAGSVAERD.

Ejnar Munksgaard Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.

FINNLANDO: Akateeminen Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO: Agence Littéraire et Artistique Parisienne 7 Rue Debelleyme, PARIS 3. Société Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PARIS 9.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO: Újváry-Griff Titurel strasse 2, 8 MÜNCHEN 81.

Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34. Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1. W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

ISRAELO: Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV Lepad Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA A. Fischer, R. Strauss 3. JERUSALEM

ITALIO: Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

JAPANIO: Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27, BEOGRAD

KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Arthur Street West, MONTREAL 18. Que, Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

KOREO: „Chul Bo" PHENJAN

NEDERLANDO: Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

NORVEGIO: A/S Narvesens Litteratur Tjeneste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

POLLANDO: P. K. W. Z. Ruch, ul. Wronia 23, WARSZAWA

RUMANIO: OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI OSEP, ORADEA

SOVETUNIO: Sojuzpechati, Import, Prospekt Mira 112—a MOSKVA

SVEDIO: A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, 110 10 STOCKHOLM 1. A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, 114 37 STOCKHOLM 5.

SVISIO: AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200. Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55,

ALLSCHWILL

USONO: Center of Hungarian Litterature Inc,. 1538 Scond Ave., NEW YORK 10028.

Corvin Travel and Gift cond Ave. NEW YORK Parcel Service. 1590 Second Ave., NEW YORK 10028.

Hungarian Books and Records 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21 — 105, C. 24. CARACAS

VJETNAMO: Phong Phat Hanh Bao Chi 17, Dinh Le. HANOI

Hungaroj abonu por eksterlandanoj

E HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.
XIII-a jaro, 1973. 3-a numero

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoro:
D-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Vilmos Benczik, Ada Csíszár, Ervin Fenyvesi, Zsolt Gyarmathy, d-ro Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Mária Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Újlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:
D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan jaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la tria ĝis la kvina horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepeno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224-819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per poŝtmandato.

La abono estas por jaro Ft 32,—, al eksterlando krome Ft 6,40 por afranko.

73.599 Dürer Nyomda Gyula
Indexszám: **25.377**

EN STILO DE NOVAJ TEMPOJ!

Loĝoĉambro BAJKÁL por prezo de 21700,–Ft-oj

bubiv

BELASPEKTA UNUAGRANDA BONGUSTA INTIMETOSA VALORAĴO

BUBIV—MEBLO



Konsumturist

BÁV

Kun rica sortimento de artobjektoj ni atendas vin



Niaj varoj doganlibere estas elporteblaj el la lando